



EL POPOLA ĈINIO

N.º 1

Januaro 1969

Vortoj de Prezidanto


Maŭ Zedong

El la lernantoj kulturitaj de la malnovaj lernejoj, la pliparto aŭ plejparto povas sin kombini kun la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kaj iuj eĉ ion atingis en inventado kaj kreado, sed ili devas esti reedukataj de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj sub la gvido de ĝusta linio por ĝisfunde ŝanĝi sian malnovan ideologion. Tiaj intelektuloj estas bonvenaj al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

La Albana Partia kaj Registara Delegacio Vizitas Ĉinion



Prezidanto Maŭ intime parolas kun kamarado Beqir Balluku, estro de la Albana Partia kaj Registara Delegacio, membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Albana Partio de Laboro kaj Vicprezidanto de la Konsilantaro de Ministroj kaj samtempe Ministro de Defendo de la Popola Respubliko de Albanio.



坚决粉碎美帝苏修





Parto de la kunveno de la ĉefurba popolo okazigita por varme bonvenigi la Albanan Partian kaj Registarano Delegation

Vicprezidanto Lin Biaŭ
intime parolas kun
kamarado Balluku.



Kamarado Balluku kaj
kamaradoj Goŭ Enlaj
kaj Kang Ŝeng inter la
junaj ruĝaj gvardianoj,
kiuj bonvenigas la ho-
norindajn gastojn el
Albanio.



Varma Gratulo de Prezidanto Maŭ al Kamarado Hoxha Okaze de Lia 60-jara Festo de Naskiĝtago

Tirana

Unua Sekretario de la Centra Komitato
de la Albana Partio de Laboro

Estimata kaj kara kamarado Enver Hoxha,

Okaze de via 60-jara festo de naskiĝtago, mi sendas al vi en la nomo de la Komunista Partio de Ĉinio, de la ĉina popolo kaj ankaŭ de mi mem koran, varman kaj fratan gratulon.

Vi estas la fondinto de la glora Albana Partio de Laboro kaj granda gvidanto de la heroa albana popolo. La transformiĝo de Albanio de malriĉa kaj subevoluinta lando en progresintan kaj fortikan landon socialisman estas strikte ligita kun via ĝusta gvidado.

Vi kreive kombinas la universalan veron de marksism-leninismo kun la konkreta praktiko de la albana revolucio. Vi gvidis kaj gvidas la albanan popolon starigi la diktaturon de la proletaro tra armitaj bataloj, konstrui socialismon apogante sin sur la propraj fortoj, profunde kaj daŭre disvolvi revoluciigan movadon kaj fari pinto-kontraŭpintan batalon kontraŭ la imperiismo estrata de la usona imperiismo, la moderna reviziismo estrata de la sovetunia reviziismo kaj la reakciularoj de diversaj landoj. Vi faris eminentajn kontribuojn al la revolucia afero

de la monda proletaro kaj al pliriĉiĝo kaj disvolvo de marksism-leninismo.

Kamarado Enver Hoxha, via glora historio atestas ke vi vere indas la nomon granda, heroa batalanto de marksism-leninismo.

La revolucia amikeco inter la ĉina kaj albana popoloj estas provita en intensa internacia klasbatalo. La forto produktita de tia amikeco estas neelĉerpebla kaj vere nevenkebla. Pli firme unuiĝu niaj du partioj kaj du popoloj kun la veraj marksist-leninistoj de la tuta mondo kaj diverslandaj revoluciaj popoloj por batali ŝultron ĉe ŝultro por komplete enterigi la komunajn malamikojn de la monda popolo, la usonan imperiismon kaj la sovetunian reviziismon!

Novajn venkojn kaj novajn atingojn al la Albana Partio de Laboro kaj al la albana popolo. Por ĉiam verdu la amikeco inter la du partioj kaj du popoloj de Ĉinio kaj Albanio. Sanon kaj longan vivon al vi, la granda gvidanto de la albana popolo kaj la plej intima amiko de la ĉina popolo.

Maŭ Zedong

Prezidanto de la Centra Komitato
de la Komunista Partio de Ĉinio

La 15-an de oktobro 1968

Nova Kulmino de Granda

Batala Amikeco

— Pri la vizito de la Albana Partia kaj Registara Delegacio al Ĉinio

“Intima amiko trans maro proksimas ja kvazaŭ najbaro.” Ĝuste en la tempo, kiam la popolo de nia lando batalis kun freŝa energio kaj alta entuziasmo por akiri plenampleksan venkon de la granda proletara kultura revolucio kaj varme celebris la 19-an datrevenon de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, la Albana Partia kaj Registara Delegacio estrata de Beqir Balluku, membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Albana Partio de Laboro, vicprezidanto de la Albana Konsilantaro de Ministroj kaj samtempe ministro de la Ministerio de Nacidefendo faris amikan viziton al nia lando, laŭ la invito de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la Registaro de la Ĉina Popola Respubliko.


Kiam la albanaj batalamikoj atingis Pekinon je la 29-a de septembro, 1968, ili ricevis tre solenan, varman kaj intiman bonvenigon de respondecaj kamaradoj de CK KPCĈ, la Grupo de Kultura Revolucio de CK KPCĈ kaj aliaj organizoj, Ĝou Enlaj, Kang Ŝeng, Jaŭ Venjuan, Hie Fuĝi, Vu Fahian kaj Ven Juĉeng k. a. kaj centmiloj da laboristoj kaj revoluciaj amasoj de la ĉefurbo.

“Bonvenigon al vi, senditoj de la heroa albana popolo!” La longaj vicoj de la bonvenigantaj amasoj sin etendis laŭ la larĝa strato en ambaŭ flankoj de Tian-anmen-placo. Nevideblaj estas iliaj finoj. Tiu dekojn da lioj longa strato tra la ĉefurbo fariĝis tiutage “longa koridoro de amikeco” kun multo da flirtantaj ruĝaj flagoj. Ĉe ambaŭ finoj de tiu “longa koridoro” alte staris gigantaj portretoj de la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ kaj la granda gvidanto de la albana popolo kamarado Enver Hoxha. Alte super Tian-anmen-placo ŝvebis kolosaj ruĝaj ba-

lonoj, de kiuj pendis gigantaj rubandoj kun jenaj sloganoj: “Vivu la heroa albana popolo!” “Vivu la amikeco inter Ĉinio kaj Albanio!” “Vivu la Komunista Partio de Ĉinio!” “Vivu la Albana Partio de Laboro!” “Vivu la granda gvidanto de la albana popolo kamarado Enver Hoxha!” “Vivu la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ!” La megafonoj ambaŭflanke de la strato senĉese disaŭdigis ĉinajn kaj albanajn kantojn.

La vizito de la Albana Partia kaj Registara Delegacio al nia lando havas gravan signifon kaj levis la batalan amikecon inter la du partioj kaj du popoloj de Ĉinio kaj Albanio al nova kulmino. La granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ Zedong kaj lia intima batalamiko Vicprezidanto Lin Biaŭ plurfoje intervidiĝis kun la membroj de la delegacio. Ili plene interŝanĝis opiniojn pri la aktuala internacia situacio kaj pri la interhelpo kaj kunlaborado de la du landoj kaj venis al unuanimema kono, ke estas necese plivastigi en la monda sfero la komunan batalon kontraŭ la usona imperiismo, sovetunia reviziismo kaj iliaj lakeoj. Tiu vizito faris novajn kontribuojn al plia disvolvo de la frata amikeco kaj batala solidareco inter la du partioj, du popoloj kaj du armeoj.

Sub la gvido de la Albana Partio de Laboro kun la granda marksist-leninisto kamarado Enver Hoxha ĉe la kapo, la heroa albana popolo persistas ĉe la marksism-leninisma linio, disvolvis grandiozan revoluciigan movadon kaj akiris brilan venkon unun post alia. La proponoj elmetitaj de kamarado Enver Hoxha en la unua duono de 1968 pri eduka revolucio kaj supervido de la laborista klaso puŝis la revoluciigan movadon al stadio de ankoraŭ pli vasta kaj profunda disvolviĝo. La revoluciiga



Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj kaj kamarado Balluku en la bankedo

movado de Albanio ne nur firmigis la proletaran diktaturon de tiu lando, sed ankaŭ riĉigis la historian sperton de la internacia proletara diktaturo, kaj tial faris gigantan kontribuon al la internacia komunisma movado.

En sia parolado ĉe la bonveniga bankedo al la Albana Partia kaj Registara Delegacio, kamarado Ĝoŭ Enlaj, konstanta komitatano de la Politika Buroo de CK KPCĈ kaj ĉefministro de la Ŝtata Konsilo alte taksis la eminentan kontribuon faritan de la Albana Partio de Laboro en la batalo kontraŭ la usona imperiismo, sovetunia reviziismo kaj diverslandaj reakciularoj. Li diris: "En ĉiu ŝlosila momento de la luktego kontraŭ la usona imperiismo kaj sovetunia moderna reviziismo, la glora Albana Partio de Laboro kaj la heroa albana popolo, alte

tenantaj revolucion standardon kontraŭ imperiismo kaj reviziismo, ĉiam senescepte staras ĉe la plej fronta vico de la batalo kun sentima heroismo kaj donis pezan baton unu post alia al la usona imperiismo kaj sovetunia reviziismo. Antaŭnelonge, vi faris senkompatan malkaŝadon kaj indignan kondamnon kontraŭ la damninda krimo de la renegata kliko de la sovetunia reviziismo kaj ĝiaj sekvantoj en armita okupo al Ĉeĥoslovakio kaj kontraŭ la perfida ago de genufleksa kapitulaco de la ĉeĥoslovaka reviziisma gvidanta kliko, firme subtenis la ĉeĥoslovakon popolon kaj aliajn orienteŭropajn popolojn en ilia batalo kontraŭ la moderna reviziismo kun la sovetunia reviziisma renegata kliko kiel la centro kaj montris en tio altan marksism-leninisman principecon kaj noblan spiriton de proletara internaciismo. Kaj lastatempe,



Kamaradoj Ĝoŭ Enlaj, Kang Ŝeng, Balluku k. a. iras mano en mano en la bankedan salonegon.

kuraĝante malestimi la ‘koloson’ de sovetunia reviziismo vi decideme deklaris pri retiriĝo el la Varsovia Traktato. Tio ĉi estas tre brava revolucia ago. Ĝi multe kreskigis la batalvolon de la revoluciaj popoloj de la mondo kaj forte batis la arogantecon de la usona imperiismo kaj sovetunia reviziismo, faris novan gigantan kontribuon al antaŭenpuŝado de la batalo de la orienteŭropaj popoloj kaj la popoloj de la ceteraj partoj de la mondo kontraŭ la usona imperiismo kaj sovetunia reviziismo, kaj gajnis varman laŭdon kaj senliman estimon de la revoluciaj popoloj de la tuta mondo.

“Antaŭ la minaco de la sovetunia reviziismo, la Albana Partio de Laboro, alte tenanta la grandan standardon de marksism-leninismo, kuraĝe gvidas kaj mobilizas la popolon de la tuta lando altigi sian singardemon, plifortigi la preparadon kontraŭ eventuala milito, kaj la tuta nacio kun alta batal-spirito pretas doni fortan baton al ĉiuj malamikoj, kiuj aŭdacos ĝin invadi. La granda gvidanto de la albana popolo kamarado Enver Hoxha diris:

‘Viro kiu povas timigi la albanan popolon ne estis kaj estas ankoraŭ ne naskita. La popolo kaj partio defendantaj la landlimojn kaj teritorion de Albanio forte batos ĉiujn kiuj aŭdacos ilin invadi.’ Tio ĉi plene manifestis la altan volon de la heroo albana popolo ne timi tiranan potencon kaj kuraĝi batali kaj venki.”

Malkaŝante la agresecon de la Varsovia Traktato, kamarado Ĝoŭ Enlaj montris: “La Varsovia Traktato sub la kontrolo de la sovetunia reviziisma renegata kliko jam delonge fariĝis agresiva kaj kontraŭsocialisma pakto. Same kiel la Nordatlantika Traktata Organizo kaj aliaj traktataj organizoj sub la kontrolo de la usona imperiismo, ĝi estas instrumento por antaŭenpuŝi novan koloniismon kaj rimedo de la sovetunia reviziismo por fari kontraŭrevolucionan negocon, denove dividi la mondon kaj difini influferon kun la usona imperiismo. Nun, la popoloj de la tuta mondo pli kaj pli klare vidas, ke la sovetunia reviziismo kaj la usona imperiismo estas varoj de unu sama

speco. La usona imperiismo senbride agresas Vjetnamion, la sovetunia reviziismo senbride invadas Ĉeĥoslovakion, kaj la usona imperiismo kaj sovetunia reviziismo faras komploton inter si por forvendi la arabajn popolojn, ĉio ĉi tio pruvas, ke la usona imperiismo kaj la sovetunia reviziisma renegata kliko ambaŭ estas la plej ferocaj malamikoj de la popoloj de la tuta mondo. Por akiri liberiĝon, la popoloj de okcidenta Eŭropo, orienta Eŭropo, Azio, Afriko, Latinameriko kaj la ceteraj landoj de la mondo nepre devas tute entombigi la Nordatlantikan Traktatan Organizon sub la kontrolo de la usona imperiismo, la Varsovian Traktaton sub la kontrolo de la sovetunia reviziisma renegata kliko kaj la aliajn agresajn traktatojn, kaj nepre devas decideme faligi imperiismon estratan de la usona imperiismo kaj la modernan reviziismon kun la sovetunia reviziisma renegata kliko kiel la centro.”

En sia telegramo al la gvidantoj de Albanio, la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ diras: **“Se la usona imperiismo, la sovetunia**

moderna reviziismo kaj iliaj lakeoj aŭdacos tuŝi haretan de Albanio, ilin atendos nur ĝisfunda, hontinda kaj neriparebla fiasko.”

La Albana Partio de Laboro ja plene meritas la nomon granda marksism-leninisma partio. La albana popolo ja plene meritas la nomon granda heroo popolo. La Albana Popola Respubliko ja plene meritas la nomon firma socialisma ruĝa citadelo alte staranta en Eŭropo.

Dum sia vizitado al nia lando, la Albana Partia kaj Registara Delegacio estrata de kamarado Balluku vizitis fabrikojn, vilaĝojn, trupojn kaj lernejojn kaj havis intervidojn kun laboristoj, kamparanoj, batalantoj, revoluciaj kadroj, ruĝaj gvardianoj kaj revoluciaj intelektuloj. Kamarado Balluku faris plurajn tre entuziasmajn, gravajn paroladojn brilantajn per la penso de marksism-leninismo ĉe diversaj kunvenoj.

Kamarado Balluku diris: “La granda proletara kultura revolucio saĝe iniciatita kaj gvidata de Prezidanto Maŭ Zedong jam akiris unu post alia decidajn atingojn en la tuta granda socialisma

Kelkcent miloj da revoluciaj popolanoj de la ĉefurbo plej varme bonvenigas la Albanan Partian kaj Registaran Delegacion.



Ĉinio. Ni elkore gratulas vin pro tiuj akiritaj brilaj venkoj kaj esprimas al vi nian plenan fidon: Sur via glora revolucia vojo, novaj kaj ankoraŭ pli brilaj venkoj atendas vin, ĉar la granda Komunista Partio de Ĉinio kun kamarado Maŭ Zedong ĉe la kapo estas gvidanta la grandan ĉinan popolon kun raraj decidemo kaj kuraĝo. Tio ĉi estas plej fidinda garantio por marŝi senĉese al novaj venkoj de la revolucio. Dank' al tiu ĉi ĝusta kaj malproksimvida marksism-leninisma gvido, la revolucia Ĉinio, Ĉinio travivinta multajn miraklajn heroajn batalojn en la armita popola revolucio, Ĉinio de la granda proletara kultura revolucio jam tute ruĝiĝas hodiaŭ, kaj ŝi disradias fortajn brilojn al ĉiuj direktoj tra la tuta mondo.”

En siaj pluraj paroladoj, kamarado Balluku foje kaj refoje donis altan takson pri la giganta signifo de la granda proletara kultura revolucio kondukata en nia lando. Li diris: “La granda venko de la granda proletara kultura revolucio definitive frakasis la kontraŭrevolucionan intrigon de la usona imperiismo kaj sovetunia reviziismo intence klopodi ĉiamaniere por efektiviĝi ‘pacan evoluon’, restaŭri kapitalismon kaj vaste praktiki reviziismon en Ĉinio.

“La granda proletara kultura revolucio manifestis la neelĉerpeblan forton de la centmilionoj da ĉinaj revoluciaj popolanoj, manifestis la vivforton de la granda marksism-leninisma penso de kamarado Maŭ Zedong, kaj pliapaŝe fortigis kaj firmigis la proletaran diktaturon de Ĉinio. Per siaj teoriaj kaj praktikaj instruoj kamarado Maŭ Zedong pliriĉigis marksism-leninismon. La popolo de nia lando, la Albana Partio de Laboro kaj nia registaro kore gratulas la fratan popolon de Ĉinio pro la akiritaj venkoj kun monda historia signifo, kaj tute rigardas ilin kiel niajn proprajn venkojn kaj kiel gigantajn kontribuojn al la afero de la monda revolucio.”

Parolante pri la internacia prestiĝo kaj eminenta rolo ludata de Ĉinio en la batalo kontraŭ imperiismo kaj reviziismo, kamarado Balluku diris: “La internacia situacio estas bonega por la revoluciaj kaj progresemaĵoj fortoj de la mondo. La imperiistoj estrataj de la usona imperiismo kaj la modernaj reviziistoj estrataj de la sovetunia renegata kliko falis en profundajn kontraŭdirojn en- kaj eksterlandajn, ili havas tre malfacilajn tagojn kaj trafis malvenkon unu post alia. La intrigoj kaj postkulisaj agoj por akiro de monda hegemonio fare de imperiismo kaj reviziismo jam estis kaj estas pli nude malkaŝitaj tagon post tago. Sub la direktado de la ĉiamvenka penso de Prezidanto

Maŭ Zedong la granda ĉina popolo forte leviĝis por oponi tiujn kontraŭrevolucionajn aktivadojn, senŝanceliĝe iras en la frontaj vicoj de ĉiuj liberamaj popoloj, kaj marŝas antaŭen sur la venka vojo de marksism-leninismo kaj la tutmonda revolucio. Hodiaŭ, la Ĉina Popola Respubliko jam fariĝis potenca socialisma lando. Ĝi posedas modernan industrion, antaŭirantan socialisman agrikulturon, proletarajn edukon kaj kulturon, sciencteknikon kun alta monda nivelo kaj potencajn, nedetruiblajn nacidefendajn fortojn. Antaŭ ĉio, la glora septcentmiliono ĉina popolo armita per la spirita atomarmilo de la granda marksism-leninisma penso de kamarado Maŭ Zedong posedas samtempe atomarmilojn kaj hidrogenarmilojn, tiamaniere do oni jam havas ĉion necesan por ĝisfunde frakasi ĉian ajn intrigon de aŭdaca agreso fare de la usonaj imperiistoj aŭ la ĥruŝĉovaj modernaj reviziistoj kontraŭ la Ĉina Popola Respubliko. La atomaj armiloj posedataj de la glora ĉina popolo ne nur rompis kaj frakasis la monopolon de imperiismo kaj reviziismo kaj faris Ĉinion nuklea potenco, sed ankaŭ estas fidinda garantio por la granda afero de batalado por akiri la venkon de revolucio kaj socialismo kaj por defendi la pacon en Azio kaj en la mondo. Hodiaŭ la granda popola Ĉinio jam fariĝis nevenkebla giganto kun nobla internacia prestiĝo. Sen la voĉo de Ĉinio, neniu ajn grava internacia politika problemo povas esti solvita kaj pridecidita.”

La intervidiĝoj kaj interparoloj faritaj de la Albana Partia kaj Registara Delegacio kun gvidantoj de la ĉinaj kompartio, registaro kaj Popola Liberiga Armeo karakteriziĝas, same kiel antaŭe, per tio, ke ambaŭ flankoj havas plenan unuecon en penso kaj komuna ago ĉe ĉiuj problemoj ilin interesantaj. Niaj du marksism-leninismaj partioj, la Komunista Partio de Ĉinio kaj la Albana Partio de Laboro sub la gvido de kamarado Maŭ Zedong kaj kamarado Enver Hoxha, senrezerve subtenas la diverslandajn popolojn en iliaj revolucia batalo por libero kaj sendependeco kaj batalo por naciliberiĝo, forte kaj senrezerve subtenas la heroan armitan batalon de la frata vjetnama popolo kontraŭ la usona agreso, subtenas la justan batalon de la arabaj popoloj kontraŭ la agreso fare de Usono kaj Izraelo, firme subtenas la batalon de la ĉeĥo-slovaka popolo kaj la aliaj orienteŭropaj popoloj kontraŭ la sovetunia reviziisma kliko kaj firme subtenas la revoluciajn movadojn de popoloj en okcidenta Eŭropo kaj norda Ameriko kaj de ĉiuj subpremataj popoloj kaj nacioj en Azio, Afriko kaj Latinameriko.

Tri Gravaj Paroladoj de Kamarado Enver Hoxha Aperis Ĉine en Nia Lando




Kamarado Enver Hoxha

Tri gravaj paroladoj de la granda gvidanto de la albana popolo Enver Hoxha estis tradukitaj en la ĉinan lingvon kaj aperigitaj libroforme de la Popola Eldonejo. Ili estas *Plua Revoluciigo de la Partio kaj Regpotenco*, *Pri la Plua Revoluciigo de la Lernejoj de Nia Lando* kaj *La Parolado en la Akcepta Kunveno Okazigita de la Ĉina Ambasadorejo al Albanio por Celebri la 19-an Datrevenon de Fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko*.

Estis eldonita libroforme ankaŭ la grava artikolo *La Laborista Klaso en Reviziismaj Landoj Devas Sinjeti en Batalon kaj Restarigi la Diktaturon de la Proletaro*, aperigita en la albana ĵurnalo *Zëri i Popullit* en la 24-a de marto 1968.

De la 16-a de oktobro 1968, tiuj libroj estas vendataj unu post alia en Hinhua-Librejoj en diversaj lokoj de la tuta lando.

Grava Surskribo de Prezidanto



En la 18-a de septembro 1962, Prezidanto Maŭ akceptis la Delegacion de Japanaj Laboristoj-Lernoaktivuloj al Ĉinio kaj faris por la japanaj laboristoj-amikoj gravan surskribon. Ĝia plena teksto legiĝas jene:

Nur se efektive kombini la universalan veron de marksism-leninismo kun la konkreta praktiko de la japana revolucio, do la japana revolucio sendube venkos.


La Direkto al Venko de la Revoluciaj Popoloj de Ĉiuj Landoj

Ĉefartikolo de *Popola Ĵurnalo*
(La 18-an de septembro, 1968)

LA 18-an de septembro, 1962, Prezidanto Maŭ Zedong faris aŭtografon dediĉe al japanaj laboristoj-amikoj: “Nur se efektive kombini la universalan veron de marksism-leninismo kun la konkreta praktiko de la japana revolucio, do la japana revolucio sendube venkos.” Hodiaŭ estas la 6-a datreveno de la brila surskribo, kaj nia ĵurnalo publikigis en la fronta paĝo la aŭtografon de Prezidanto Maŭ. La surskribo de Prezidanto Maŭ havas tre gravan kaj profundan signifon ne nur por la revolucia afero de la japana popolo, sed ankaŭ por la revolucia afero de ĉiuj popoloj de la mondo.

Sen revolucia teorio ne estas revolucia movado. Marksism-leninismo estas kristaliĝo de la plej korektaj kaj plej revoluciaj sciencaj ideoj de la monda proletaro, kaj universala vero senescepte aplikebla por la tuta mondo. Kiam la proletaro kaj la vastaj revoluciaj popolamasoj de ĉiuj landoj ekposedas marksism-leninismen, ili povas tuj produkti neelĉerpeblan saĝon kaj forton por antaŭenpuŝi venkan disvolvadon de la revolucia afero. La kombiniĝo de marksism-leninismo kun

Maŭ por Japanaj Laboristoj-Amikoj



Skribita dediĉe al la japanaj laboristoj-amikoj laŭ la peto de la amikoj de la Delegacio de Japanaj Laboristoj-Lernoaktivuloj al Ĉinio.

Maŭ Zedong

La 18-an de septembro 1962

la konkreta praktiko de revolucio de ĉiuj landoj estas la plej baza garantio por la venko de la revolucia afero de la popoloj de ĉiuj landoj.

Dum sia gvido de la ĉina revolucio, Prezidanto Maŭ ripetfoje instruis al ni: “**Estas necese unuigi komplete kaj konvene la universalan veron de marksismo kun la konkreta praktiko de la ĉina revolucio.**” “**Strikte ligi la teorion de marksism-leninismo kun la praktiko de la ĉina revolucio, tio estas la konstanta ideologia principo de nia partio.**” Ĝuste tiel agas la Komunista Partio de Ĉinio. Kiam la universala vero de marksism-leninismo kombiniĝis kun la praktiko de la revolucia batalo de la proletaro kaj la vastaj popolamasoj de Ĉinio, ĝi tuj fariĝis ĉiamvenka armilo en la mano de la ĉina popolo.

Prezidanto Maŭ prezentis figure la ligan de teorio kun praktiko kiel “**pafon de sago kun celo**”. Kamarado Maŭ Zedong ja uzas la marksism-leninism-on kiel “**sagon**” por pafi la ĉinan revolucion kiel la “**celon**”, ellaboris tutan sistemon de teorio, linio, orientiloj, politikoj kaj taktikoj por la periodoj de

la demokratia revolucio, la socialisma revolucio en Ĉinio kaj por la daŭra revoluciado sub la kondiĉoj de la diktaturo de la proletaro, kaj tiel gvidas la ĉinan revolucion de venko al venko.

Kombini marksism-leninism-on kun la konkreta praktiko de la revolucio en la propra lando, tiu ĉi principo konvenas kiel al la ĉina revolucio, tiel ankaŭ al la revolucio en Japanio kaj ĉiuj aliaj landoj. Tio signifas, ke la proletaraj partioj de ĉiuj landoj devas, unuflanke, persisti ĉe la universala vero de marksism-leninismo kaj, aliflanke, elirante el la reala vivo, intime ligiĝi kun la amasoj, senĉese resumi la sperton de amasaj bataloj, memstare ellabori kaj praktiki politikojn kaj taktikojn konvenajn al la kondiĉoj de sia lando. La reviziisma kliko de Ĥruŝĉov forĵetis la universalan veron de marksism-leninismo sub la preteksto de la t. n. “**kreiva disvolvo de marksism-leninismo**”, tio estas centpocenta oportunismo, nome la moderna reviziismo!

Sub la preteksto de diferenco de “**la internaj kaj eksteraj kondiĉoj**” de Japanio, la reviziisma

renegata kliko de Mijamoto reklamas la t. n. "sendependecon kaj memstarecon", tio fakte estas entute diabla mensogo. Buŝe ili ankaŭ parolas pri marksism-leninismo, sed tio, kion ili plenenergie atakas kaj oponas, estas ĝuste la bazo el la bazoj de marksism-leninismo. Per la tuta forto ili distordas kaj kastras marksism-leninismen, oponas kontraŭ perforta revolucio kaj armita kapto de regpotenco, distrumpetas la t. n. "pacan revolucion" kaj antaŭenpuŝas la t. n. "parlamentan vojon". Fakte ili rifuzas, perfidas kaj oponas revolucion. Ili estas bando da hontindaj centpocentaj renegatoj de marksism-leninismo kaj hontindaj perfiduloj de la japana revolucia afero.

Hodiaŭ, tempeste disvolviĝas la revolucia batalo de la japana popolo, senĉese altiĝas ĝia revolucia konscio, kreskas kaj fortiĝas ĝia maldekstrula vicaro el veraj marksist-leninistoj tagon post tago. La proletaraj revoluciuloj kaj vastaj revoluciaj popolamasoj de Japanio forte ribelas kontraŭ la reviziisma kliko de Mijamoto kaj prenas la veran marksism-leninismen kiel potencon armilon en sia batalo kontraŭ la usona imperiismo, la japana monopola burĝaro kaj la moderna reviziismo. La situacio de la japana revolucio fariĝas ĉiam pli bona. La japanaj proletaraj revoluciuloj ekkonsciis, ke la glora kaj serioza tasko staranta antaŭ ĝi estas: plie serioze kaj konkrete apliki la veran marksism-leninismen en la praktikadon de la re-



Alte tenante portreton de Prezidanto Maŭ, japanaj popolanoj manifestacias, laŭtvoĉe kriante la sloganojn "Faligi la usonan imperiismon!" "Faligi la japanan naciperfidan klikon de monopola kapitalo!"

Japanaj revoluciaj laboristoj de Minato-kvartalo de Tokio studas la gravan surskribon de Prezidanto Maŭ.



volucia batalo de la japana popolo, solvi serion da strategiaj kaj taktikaj problemoj en la japana revolucio elirante el la konkretaj kondiĉoj de Japanio kaj senĉese puŝi antaŭen la revolucion de Japanio. La procezo de la venko de la japana revolucio estas nepre tiu de ĉiam pli strikta kombiniĝo de marksism-leninismo kun la konkreta praktiko de la japana revolucio.

Ni firme konvinkiĝas, ke en la flamo de revolucia batalo certe naskiĝos vera revolucia partio de Japanio armita per marksism-leninismo. Ĝi gvidos la proletaron kaj vastajn popolamasojn de Japanio konkeri ĉiujn malfacilojn kaj obstaklojn kaj gajni la finan venkon de la revolucio post longdaŭra kaj zigzaga batalo.



Laboristaj reprezentantoj el Hiangtan-regiono, la hejmloko de Prezidanto Maŭ, kunportis al la ĉefurbo du pinidojn de la loko, kie iam loĝis Prezidanto Maŭ, priverŝitajn per la akvo el lageto, en kiu iam naĝis Prezidanto Maŭ, kaj arbeton de ora oranĝo (Citrus nobilis) el Hiangtan, por esprimi altestime sian fidelecon al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ.

La Ĉina Laborista Klaso Ĉiam Fidelas al Prezidanto Maŭ

HINHUA

EN la 5-a de oktobro 1968 estis skribita nova plej brila ĉapitro en la grandiozan historian libron pri la suriro de la laborista klaso sur la politikan scenejon de batalo, kritiko kaj reformo en la superstrukturo: nia granda instruanto Prezidanto Maŭ kaj lia intima batalamiko Vicprezidanto Lin Biaŭ akceptis en la grandioza Popola Halo la eminentajn reprezentantojn de la laborista klaso, kiuj venis el 29 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj por partopreni la solenon de la Nacia Festo en la ĉefurbo. Tio estis la plej granda gloro kaj plej granda feliĉo por la laborista klaso kaj popolo de la tuta lando!

Je 40 minutoj post la 8-a horo tiuvespere, kun vizaĝo radianta de sano kaj vigeleco, Prezidanto

Maŭ tre ĝoje venis al la halo per firmaj paŝoj por intime vidi la laboristojn-kamaradojn. Li intime mansignis por saluti la ĉeestantojn. La sango ekbolis al la eminentaj laboristaj reprezentantoj, kiuj estas senlime fidelaj al la granda ĉefkomandanto Prezidanto Maŭ, kaj feliĉaj sentoj tajde ŝvelis en ilia koro. "Vivu Prezidanto Maŭ!" "Longe vivu Prezidanto Maŭ!" "Senfine longan vivon al Prezidanto Maŭ! Senfine longan vivon!" Ili milfoje kaj milfoje kriis, svingante la ruĝan libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* en la mano. Multaj malfermis la revolucian trezoran libreton kun larmoj de feliĉo sur la vangoj, notis la horon de la momento plej feliĉa kaj neforgesebla por la tuta vivo kaj skribis sian ĵuron kaj decidon sur la frontan paĝon: "Senlime fidelu al Pre-

zidanto Maŭ, senlime fidelu al la penso de Maŭ Zedong, senlime fidelu al la revolucia linio de Prezidanto Maŭ.” “Studu verkojn de Prezidanto Maŭ, aŭskultu liajn instrukciojn, agu laŭ liaj instrukcioj kaj fariĝu lia bona laboristo.”

Post la fino de la akceptado, bolanta ĝojego regis sur Tian-anmen-placo. Multaj reprezentantoj kolektiĝis antaŭ la portego Tian-anmen por ankoraŭfoje prezenti sian fidelan koron al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, spite al la pluvo. Ili kantis kaj dancis fojon post fojo en la pluvo: “Grandaj estas la ĉielo kaj tero, sed ne tiom kiom la bonfaroj de la Partio. Karaj estas la patro kaj patrino, sed ne tiom kiom Prezidanto Maŭ.”

Ĝang Mohaj, maljuna laboristo de Hiangnan-a Ŝtala Fabriko kaj reprezentanto el Hunan, la hejmloko de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, estis aparte emociita. Tiu mizerulo kiu almozpetis ĉie kaj suferis plene la turmentadojn de bienuloj kaj kapitalistoj en la malnova socio, jam de longe esperis vidi Prezidanton Maŭ. Nun lia revo realiĝis! Ĉifoje li estas elektita kiel reprezentanto por veni ĉe Prezidanton Maŭ kaj partopreni la Nacian Feston. Dum la tuta vojaĝo, de Hiangtan al Ĉangŝa kaj de Ĉangŝa al Pekino, la amasoj lin adiaŭis, ornamis per ruĝaj floroj kaj admonis ree kaj ree, ke li plej rapide sendu informon hejmen tuj kiam li vidos Prezidanton Maŭ. Portante kun si la koran peton de la laboristaj amasoj, li estis okupita de la penso kirliĝanta en sia korfundo dum la vojaĝo: Se ne estus la saĝa gvidado de Prezidanto Maŭ, kiel la laborista klaso povus havi la hodiaŭan tagon! Tuj post la akcepto, li rapi-



Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj lia intima batalamiko Vicprezidanto Lin Biaŭ intime akceptas eminentajn reprezentantojn de la laboristaro de nia lando. La reprezentantoj varme aklamas: “Vivu Prezidanto Maŭ! vivu, vivu longe!”

dis al sia hotelo por telefone kaj telegrafe sendi al siaj batalamikoj en Hunan la ĝojigan informon: “La granda gvidanto Prezidanto Maŭ akceptis nin kaj lia farto estas trege bona!”

“Longa estas la rivero Jalucangpo kaj alta estas la montpinto Ĝolmolungma, sed ne tiom longa kaj tiom alta kiom la bonfaroj de Prezidanto Maŭ.” La plejparto de la tibetaj reprezentantoj estis antaŭe servutuloj kaj ĉiu havas sian personan historion plenan de sango kaj larmoj. Estas Prezidanto Maŭ, kiu savis ilin el maro de suferoj kaj edukis ilin en la unuan generacion de tibetaj industriaj laboristoj. Nun, ili senretene dancis de ĝojo kaj plenvoĉe kantis: Estimata kaj kara Prezidanto Maŭ, vi estas la plej ruĝa suno en nia koro. Hodiaŭ ni vidis vin. Ni estas la plej feliĉaj homoj en la mondo!



pri la tuta klasa malamo de sango kaj larmoj. Ŝi diris ke la laborista klaso povas havi la hodiaŭan tagon danke nur al Prezidanto Maŭ. Ni devas nepre sekvi Prezidanton Maŭ strikte kaj preni sur nin la pezan historian taskon: **“La laborista klaso nepre devas gvidi ĉion.”**

La intima akcepto fare de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ donis neelĉerpeblan forton al la laboristaj reprezentantoj. Ili amase faris decidojn, ĵurojn kaj planojn. Ili diris: Ni antaŭeniras tuj kiam Prezidanto Maŭ mansignas! Ni nepre sekvos strikte Prezidanton Maŭ kaj la proletaran komandojn kun Prezidanto Maŭ kiel la estro kaj Vicprezidanto Lin kiel la vicedstro kaj bone plenumos la grandan historian

La ĉirkaŭ dek mil laboristaj reprezentantoj, kiuj venis al Pekino por partopreni la Nacian Feston, ĉiuj travivis en la malnova socio sangan, mizeran vivon. Kiam ili rememoris pri la pasinta amaro en la feliĉa momento de la aŭdienco fare de Prezidanto Maŭ, ili des pli sentas la dolĉan vivon de la hodiaŭo kaj sian amon al Prezidanto Maŭ. Ĉen Bejĉan, maljuna laboristino de la Gujjang-a Kotona Ŝpina kaj Teksa Fabriko, kiu estis vendita kiel ĉambristinetino de bienulo kaj laboris kiel infanlaboristo de la nomita fabriko en la malnova socio, hodiaŭ estis akceptata de Prezidanto Maŭ kiel glora membro de la laborista klaso. En tiu plej feliĉa momento, ŝi ekmemoris pri la gepatroj mortintaj sub la vipo kaj turmentado de bienuloj, pri sia juna fratino vendita sub la devigo de la centfamilia estro, pri la amaraj tagoj, en kiuj ŝi laboregis por kapitalistoj, kaj

taskon de batalo, kritiko kaj reformo en la diversaj sferoj de la superstrukturo, kiun al ni asignis Prezidanto Maŭ.

La reprezentantoj de la pekinaj laboristoj jam estis intime akceptitaj de Prezidanto Maŭ en la 15-a de aŭgusto, kaj ĉifoje ili ree vidis Prezidanton Maŭ kune kun la batalamikoj el aliaj lokoj de la lando. Por esprimi la decidemon de la pekina laboristaro strikte sekvi la grandajn strategiajn dispoziciojn de Prezidanto Maŭ kaj bone gvidi la laboron de batalo, kritiko kaj reformo en la diversaj sferoj de la superstrukturo kune kun la laborista klaso de la tuta lando, ili donacis al reprezentantoj de aliaj lokoj reproduktajn imitaĵojn de mangoj — la kara donaco, kiun Prezidanto Maŭ donis al la ĉefurbaj laboristaj propagandaj taĉmentoj de la penso de Maŭ Zedong.

Kiam la laboristaj reprezentantoj de la Pekina Ĝenerala Trikota Fabriko, Pekina Hinhua-presejo, Pekina Kemia Fabriko N-ro 3, Pekina Unua Ilmaŝina Fabriko, Pekina Dua Ilmaŝina Fabriko, Pekina Guanghua-a Lignaĵa Fabriko k. a. rapide komunikis la ĝojigan informon vidi Prezidanton Maŭ al siaj fabrikoj, la vastaj amasoj de revoluciaj oficistoj kaj laboristoj estis treege kuraĝigitaj kaj decidis levi novan altan tajdon de batalo, kritiko kaj reformo.

De kiam Guo Sangen, laboristino de la Ŝanhaja Dizel-fabriko kaj vicregimentestrino de la laboristaj propagandaj taĉmentoj de la penso de Maŭ Zedong en Fudan-universitato en Ŝanhajo, vidis la grandan gvidanton Prezidanton Maŭ, ŝi ĉiam cerbumadis pri la problemo, kiel plej rapide kaj plej komplete efektiviĝi la serion da lastaj instrukcioj de Prezidanto Maŭ, por konduki la edukon revolucion en la universitato ĝis la fino. Jam estis profunda nokto kaj ŝi ankoraŭ skribis absorbite en sian taglibron: Prezidanto Maŭ akceptis nin laboristajn reprezentantojn, tio estas la plej granda kuraĝigo kaj plej granda konfido al ni laborista klaso. Ni nepre ne vanigu la esperon de Prezidanto Maŭ metitan sur nin, kaj nepre sekvu la instruojn de Prezidanto Maŭ por bone plenumi la taskon de batalo, kritiko kaj reformo en Fudan-universitato kaj fari novajn kontribuojn en batalakiro de kompleta venko de la granda proletara kultura revolucio.

Giang Fa, membro de la laborista propaganda taĉmento de la penso de Maŭ Zedong en la Flegista Lernejo sub la Medicina Instituto "Ĝongŝan" en Kantono kaj maljuna laboristo de la Kantona Fabriko de Pezaj Maŝinoj, firme postulis kaj partoprenis la propagandan taĉmenton, kiam Prezidanto Maŭ donis la instrukcion **"en la efektiviĝo de la proletara revolucio en eduko, necesas**

havi la gvidadon de la laborista klaso kaj la partoprenon de la laboristaj amasoj", malgraŭ ke post du monatoj li jam estos atinginta la aĝon de emeritiĝo. Li diris: "Prezidanto Maŭ mansiĝis al ni laborista klaso, mi ne devas emeritiĝi, sed antaŭeniri!" Enirinte en la lernejon, li faris klasan edukon al la junuloj utiligante kiel materialon siajn personajn travivaĵojn, organizis la revoluciajn instruistojn kaj lernantojn por energie malkovri kaj kritiki la ĝisĉielajn krimajn agojn de la ĉina Ĥruŝĉov en antaŭenpuŝado de la kontraŭrevolucia reviziisma eduka linio, kaj tre rapide mobilizis la amasojn levi la altan tajdon de batalo, kritiko kaj reformo. Ricevinte aŭdiencon ĉe Prezidanto Maŭ, li diris kun nekomparebla emocio: "Ĉiu nova instrukcio de Prezidanto Maŭ koncentras nian volon kaj reprezentas la interesojn de ni laborista klaso. Nur se ni precize agas laŭ ĉiuj vortoj kaj ĉiuj frazoj de la instrukcioj de Prezidanto Maŭ, ni certe povas gvidi ĉion kaj bone fari batalon, kritikon kaj reformon kaj plenumi la grandan historian taskon, kiun asignis al ni Prezidanto Maŭ.

La granda gvidanto Prezidanto Maŭ instruis al ni: **"Ankaŭ la laborista klaso devas senĉese altigi sian politikan konscion en batalo."** Sub la forta kuraĝigo de la aŭdienco ricevita ĉe Prezidanto Maŭ, kun vigla spirito kaj alte levita batalvolo, la eminentaj reprezentantoj de la laborista klaso el diversaj lokoj decidis pli alte teni la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, strikte sekvi la grandajn strategiajn dispoziciojn de Prezidanto Maŭ, pli bone kreive studi kaj kreive apliki la penson de Maŭ Zedong, senĉese altigi sian politikan konscion, serioze kaj bone plenumi batalon, kritikon kaj reformon, teni la revolucion kaj stimuli la produkton, kaj akiri la ĉiuf flankan venkon de la granda proletara kultura revolucio!



Laboristaj reprezentantoj el diversaj lokoj de la lando, kiuj venis al la ĉefurbo por partopreni la celebradon de la Nacia Festo, vizitas Kinghua-universitaton kaj ricevas varman bonvenigon de la laborista propaganda taĉmento de la penso de Maŭ Zedong kaj revoluciaj instruistoj, studentoj kaj laboristoj de tiu universitato.

La Laborista Klaso Devas por Ĉiam Gvidi la Lernejojn

VANG KINGJI, ĈEN GENHUAN K. A.*

DANK' al la granda proletara kultura revolucio okazis mondsdua ŝanĝiĝo en nia granda patrolando. Ĉiu nia venko estas akirita sub la saĝa gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ.

En la tempo por batalakiri plenampleksan triumfon de la granda proletara kultura revolucio, Prezidanto Maŭ donis al ni instrukcion, montrantan la klaran direkton kaj vojon por la proletara revolucio en eduko. Prezidanto Maŭ diris: "En la efektivigo de la proletara revolucio en eduko, necesas havi la gvidadon de la laborista klaso kaj la partoprenon de la laboristaj amasoj kiuj, en kunlaborado de la batalantoj de la Liberiga Armeo, efektivos revolucion triflankan kombiniĝon kune kun la aktivuloj inter la lernantoj, instruistoj kaj laboristoj en la lernejoj, kiuj decidis konduki la proletaran revolucion en eduko ĝis la fino. La laboristaj propagandaj taĉmentoj devas longdaŭre resti en la lernejoj, partopreni la plenumon de ĉiuj taskoj de batalo, kritiko kaj reformo en la lernejoj, kaj por ĉiam gvidi la lernejojn. En la kamparo, la lernejoj devas esti administrataj de la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj — la plej fidinda aliancano de la laborista klaso."


La instrukcio de Prezidanto Maŭ reprezentas la fundamentajn interesojn de ni laborista klaso kaj de la revolucia popolo, spegulas niajn urgajn postulojn, eldiris tion, kio estas en nia koro, kaj ege kreskigis la batalvolon de la proletaro kaj debatis la arogantecon de la burĝaro.

Post aŭskulto de la instrukcio de Prezidanto Maŭ, ni laboristoj de aŭtomobila fabriko ĉiuj estis kuraĝigitaj, kaj multaj veteranaj laboristoj emocie larmis, esprimis unu post alia al nia amata Prezidanto Maŭ sian pretecon sekvi liajn vortojn, kaj konkure sin anoncis por enviciĝi en la laboristajn propagandajn taĉmentojn de la penso de Maŭ Zedong. Laŭ la instrukcio de Prezidanto

Maŭ nia fabriko tuj sendis elstarajn laboristojn en la propagandajn taĉmentojn por iri en lernejojn kaj gvidi tie batalon, kritikon kaj reformon, en kunlaboro kun la propagandaj taĉmentoj de PLA.

La kulturo estas kreita propre de la laboranta popolo. Tamen, en la damninda malnova socio, la regpotenco troviĝis en la manoj de la bienularo kaj burĝaro, tiel ke la batalpozicio de eduko estis tute monopoligita de ili. Ni laboristoj ne havis rajton viziti lernejojn, des pli ne eblis paroli pri gvidado de la lernejoj. Ĉu ni ne deziris lerni? Ne. Ĉu ni estis malsaĝaj? Ankaŭ ne. La lernejoj en la malnova socio funkciis ja ne por ni. Nemalmultaj el la laboristoj de nia aŭtomobila fabriko travivis suferplenan vivon en la malnova socio. En la malnova tempo, ĉu la infanoj de malriĉuloj povis viziti lernejojn, kiam ili havis nek sufiĉan manĝon nek sufiĉan vestaĵon? Ili estis analfabetaj de generacio al generacio.

Post la Liberiĝo, rezulte de la freneza antaŭenpuŝado de la kontraŭevolucia reviziisma eduka linio fare de la ĉina Ĥruŝĉov kaj liaj agentoj en la eduka rondo, la batalpozicio de lernejoj restis ankoraŭ sub la regado de burĝaraj intelektuloj. Tie la burĝaro praktikis diktaturon super ni. Ili furioze konkuris kun ni por batalakiri la junan generacion, senskrupule provante ŝanĝi la lernejojn en bazon por kulturaj reviziismajn daŭrigantojn kaj restaŭri kapitalismon. Ili oponis kontraŭ la gvido de la laborista klaso, forpuŝis gefilojn de laboristoj kaj kamparanoj kaj venenis multajn junulojn. En nia fabriko estis juna laboristo, kiu ne volis reveni al la fabriko por refariĝi laboristo post vizitado al teknika lernejo. Tion vidinte, ni laboristoj sentis grandan doloron kaj ĉagrenon en la koro. Jam delonge ni abomenis ĝisoste la fenomenon de regado de burĝaraj intelektuloj super la



Membroj de la laborista propaganda taĉmento de la penso de Maŭ Zedong, kiu venis labori en la Ĉangĉun-a Geologia Kolegio, faras korverŝan interbabilon kun la revoluciaj instruistoj kaj studentoj.

kaj la ĉinan Ĥruŝĉov. Ni plej amas socialismon kaj la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ. Ni estas fidelaj batalantoj de Prezidanto Maŭ kaj plej aŭskultas la vortojn de la proletara komando kun Prezidanto Maŭ kiel la estro kaj Vicprezidanto Lin kiel la vicedstro. La laborista klaso armita per la penso de Maŭ Zedong havas la plej klaran menson, plej akran vidon, plej distingan amon kaj malamon kaj plej grandan saĝon. Havante la saĝan gvidon de Prezidanto Maŭ kaj posedante la ĉiamvenkan penson de Maŭ Zedong, ni povas venki ĉian ajn malfacilon kaj krei ĉian ajn miraklon en la mondo. Multaj problemoj jam trovis solvon, post kiam niaj laboristaj propagandaj taĉmentoj de la penso de Maŭ Zedong eniris en la lernejojn. La faktoj pruvis, ke ni tute povas unuigi ĉirkaŭ ni la vastajn revoluciajn amasojn, sukcese konduki la kampanjon de batalo, kritiko kaj reformo kaj ludi la gvidan rolon en ĉiuj sferoj de la superstrukturo.

Prezidanto Maŭ instruas al ni: **“Ankaŭ la laborista klaso devas senĉese altigi sian politikan konscion en batalo.”**

lernejoj. Se ni ne ŝanĝus tian staton kaj ne reprenus al ni la gvidadon de la lernejoj, nia ŝtato ŝanĝos sian koloron. Kia danĝero!

Eduko estas tre grava batalpozicio. En kies manoj estas tiu ĉi batalpozicio, tio koncernas la grandan demandon kiajn daŭrigantojn ni elkulturos por nia afero. La lernejoj de la proletaro devas esti gvidataj nur de la proletaro mem kaj la revoluciaj daŭrigantoj de la proletaro povas esti elkulturataj nur de la proletaro mem. Ni laborista klaso ĝuste devas teni firme en la manoj la gvidantecon de la lernejoj kaj elkulturi plej fidindajn daŭrigantojn de la revolucia afero de la proletaro per la granda penso de Maŭ Zedong.

Ni laborista klaso nepre devas gvidi ĉion kaj certe povas gvidi ĉion. **“La laborista klaso estas la plej malproksimvida, plej malegoisma kaj plej ĝisfunde revolucia.”** Ni plej malamas kapitalismon

En la du jaroj de la granda proletara kultura revolucio ni ricevis grandan edukon. Ni profunde komprenas, ke por povi strikte sekvi la grandajn strategiajn dispoziciojn de Prezidanto Maŭ kaj plenumi la gloran taskon de li komisiitan, ni devas en la batalo konstante kreive studi kaj kreive apliki verkojn de Prezidanto Maŭ, remuldi nian mondkoncepton kaj altigi la klasan konscion de la proletaro kaj la konscion pri batalo inter la du linioj.

Jam forpasis por ĉiam la epoko, en kiu la burĝaraj intelektuloj regis niajn lernejojn. La laborista klaso nepre devas okupi la batalpozicion de lernejoj kaj komplete balai la edukan sistemon de la burĝaro en la historian rubejon.

**La verkintoj de la artikolo estas laboristoj de la Ĉangĉun-a Unua Aŭtomobila Fabriko.*

Estu Forta Apoganto de la Laborista Klaso

NIAN SIVANG*

KIAM la granda proletara kultura revolucio de nia lando eniris en sian novan periodon por “serioze kaj bone konduki batalon, kritikon kaj reformon”, la laborista klaso, laŭ la brila instrukcio de Prezidanto Maŭ “la labroista klaso nepre devas gvidi ĉion”, eksendis laboristajn propagandajn taĉmentojn de la penso de Maŭ Zedong en lernejojn altajn, mezajn kaj elementajn kaj en ĉiujn lokojn, kie amasiĝis intelektuloj, por gvidi tie la laboron de batalo, kritiko kaj reformo en diversaj sferoj de la superstrukturo. Tio estas granda strategia dispozicio elmetita de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ post resumo de la spertoj de la amasoj, granda evento de la sesdekaj jaroj de la 20-a jarcento, granda iniciato en la historio de la revolucio de la proletaro, kaj ankaŭ la baza garantio por batalakiri la ĉiuf flankan venkon de la granda proletara kultura revolucio per unuecigo de la konoj, politikoj, paŝoj kaj agoj laŭ la penso de Maŭ Zedong. Ni nepre plenumos ĝin firme, propagandos ĝin fervore kaj defendos ĝin kuraĝe!

“La laborista klaso estas la plej malproksimvida, plej malegoisma kaj plej ĝisfunde revolucia.” En majo 1968, nia roto eniris en iun fabrikon por plenumi tie la glorajn taskojn gardi la fabrikon kaj subteni la maldekstrulojn. Vivante kun la laboristoj, niaj kamaradoj pli profunde sentis, ke la laborista klaso estas plej fidela al Prezidanto Maŭ, sekvas lin plej strikte, rilatas plej intime al la Liberiga Armeo, kaj vere indas la nomon

revolucia gvida klaso. La laboristoj fulmorapide kaj firme plenumas la plej novajn instrukciojn de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj ĉiun batalordonon de la proletara komandejo.

Kiam Prezidanto Maŭ alvokis “subteni la armeon kaj ami la popolon”, ili tuj kunvokis tiucelan kunvenon kaj sendis al nia roto la plej valoran donacon — portreton de Prezidanto Maŭ kaj lian plej novan instrukcion, kaj la plej intiman zorgemon de la laborista klaso al sia propra trupo — la “trezoran heredaĵon” por la Liberiga Armeo, kudrilajn saketojn zorge faritajn. Por ke la roto ĉiam memoru la instruon de Prezidanto Maŭ “nepre ne forgesu la klasbatalon”, ili sendis maljunajn laboristojn plenajn de sufero kaj klasa malamo en la malnova socio por partopreni la amaromemorigan kunvenon de la roto. Ili kune kun ni studis verkojn de Prezidanto Maŭ, kune rememoris la amaran pasintecon kaj pensis la nunan dolĉon, kune prenis amaromemorigan manĝon kaj kune okazigis kritikan kunvenon. Ili instigis nin pli strikte sekvi la grandajn strategiajn dispoziciojn de Prezidanto Maŭ kaj fari senĉese novajn meritajn kontribuojn en la batalakiro de la ĉiuf flanko de la granda proletara kultura revolucio! La rakontado de la laboristoj pri sia amara travivaĵo en la malnova socio kaj iliaj elkoraj kuraĝigoj estis por ni viva leciono pri la bataloj inter la du klasoj kaj inter la du linioj. Kun senlime varma kaj profunda amo de la proletaro



Nian Sivang (la unua de dekstre en la fronto) juras solene antaŭ la portreto de Prezidanto Maŭ sur la pordego Tian-anmen ĉiaman fidelecon al Prezidanto Maŭ kaj firman subtenon al la laborista klaso.

al Prezidanto Maŭ kaj treege profunda kaj granda malamo al la ĉina Ĥruŝĉov, niaj kamaradoj ĥore kriis vizaĝe al portreto de Prezidanto Maŭ kun la ruĝa libreto *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* en la levita mano: Lernu de la laborista klaso! Ne forgesu la klasan amaron, ĉiam memoru la sangan malamon! Por ĉiam revoluciu strikte sekvante Prezidanton Maŭ!

La laborista klaso nepre devas gvidi ĉion, kaj ĝi povas gvidi ĉion. La laboristaj propagandaj taĉmentoj de la penso de Maŭ Zedong en multaj lokoj tra la tuta lando venis en diversajn sferojn de la superstrukturo kaj suriris la politikan scenejon de batalo, kritiko kaj reformo. Ilia revolucia praktiko jam pruvis kaj ankoraŭ daŭre pruvos, ke la laborista klaso tute povas gvidi batalon, kritikon kaj reformon en diversaj sferoj de la superstrukturo kaj skribos epokfaran, brilan paĝon en la historio de revolucio de la proletaro.

Prezidanto Maŭ instruas al ni: “Ĉiuj oficiroj kaj soldatoj de nia armeo devas bone memori konstante, ke ni estas granda Popola Liberiga Armeo kaj ni estas la trupoj gvidataj de la granda Komunista Partio de Ĉinio. Nur se ni konstante observas la direktivojn de la Partio, ni certe venkos.” Kun plena memfido, ni decide sekvos pli bone la vortojn de Prezidanto Maŭ, agos laŭ la instrukcioj de Prezidanto Maŭ, firme defendos la gvidadon de la laborista klaso, humile lernos de la laborista klaso kaj varme subtenos ĉiujn revoluciajn agojn de la laborista klaso. Ni kuraĝe estu forta apoganto de la laborista klaso, kaj brave antaŭenmarŝos laŭ la larĝa vojo al venko, montrita de Prezidanto Maŭ!

**La aŭtoro estas honorita kiel Bona Batalanto de Prezidanto Maŭ kaj Modelo de Kreiva Studo kaj Kreiva Apliko de Verkoj de Prezidanto Maŭ. Liajn heroajn farojn ni jam raportis en nia gazeto (1967, n-ro 11).*

Estu Kuracisto Bonvenigata de Malriĉkamparanoj kaj Malsuperaj Mezkamparanoj

— Pri kuracisto Huang Juhiang de Giangĝen-komunuma kuracejo de Ĉuanŝa-gubernio, Ŝanhajo

NOVA STARTO

En la jaro 1963, dudekjara Huang Juhiang revenis al Giangĝen-komunumo fininte kvinjaran lernadon en medicina kolegio. Ja estis fierinde por li ke li restas kun malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj komencos servi al ili post reveno al la hejmvilaĝo. Sed pro influo de la reviziisma eduka sistemo, iatempe li ne tiel volontis labori en la kamparo. En la komenca periodo, kvankam li estis en kamparo, tamen lia koro restis en urbo. Li kalkulis en si: Laborinte kelkajn jarojn en la kampara kuracejo, mi kaptos ŝancon por transpostenigi min en grandan hospitalon en urbo kaj tie fariĝos “doktoro” en gladita blanka surtuto.

Tial, li sidis ĉe diagnoza tablo ĉiam malabsorbata. Sidante apud li, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ĉiam trovis nur lian flegman vizaĝon kaj sentis, ke li ne estas ilia intimo.

En 1964, arde leviĝis en urboj kaj kamparo de la lando alta tajdo de granda amasa movado de kreiva studo kaj kreiva apliko de la penso de Maŭ Zedong. Kortuŝaj ekzemploj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la komunumo en kreiva studo kaj kreiva apliko de la penso de Maŭ Zedong ekedukis Huang Juhiang. Li komencis studi la brilajn verkojn de Prezidanto Maŭ *Servu al la Popolo* kaj *Memore al Norman Bethune*. En komparo kun la brilaj ekzemploj persone starigitaj de Prezidanto Maŭ, li rimarkis la “privatan kalkulon” en sia cerbo kaj sentis nedireblan honton. Li pensis en si: Prezidanto Maŭ min

kulturis, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj min nutris; sed ĉu tio decas, ke mi estas duonanima en servo al ili? Tial, li pli profunde studis la instruon de Prezidanto Maŭ: “... se la intelektuloj ne kombinas sin kun la laboristaj kaj kamparanaj amasoj, ili sukcesos en nenio. La fina dividlinio inter revoluciaj intelektuloj kaj nerevoluciaj aŭ kontraŭrevoluciaj intelektuloj estas, ĉu ili volas kaj praktikas kombiniĝon kun la laboristaj kaj kamparanaj amasoj.”

La granda instruo de Prezidanto Maŭ donis al li neelĉerpeblan forton kaj inspiron.

En tiu jaro komenciĝis grandskala preventa laboro. Huang Juhiang fariĝis “brigada kuracisto”, kun bravaj paŝoj elirinte el la kuracejo li profundigis inter malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn kaj suriris la larĝan vojon, montritan de Prezidanto Maŭ, de kombiniĝo de intelektuloj kun laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

TUTKORE SERVI AL MALRIĈKAMPARANOJ KAJ MALSUPERAJ MEZKAMPARANOJ

La roso kaj la sunlumo de la penso de Maŭ Zedong nutris tiun ĉi intelektulon el la malnova lernejo kaj igis lin suriri la vojon de tutkora servo al malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

Estis fruprintempa vespero, 1966. Huang Juhiang deĵoris en la komunuma kuracejo. Subite, en tre hasta paŝbruo, komunumanoj de Ĉenhu-brigado sendis agonian malsanulinon-malriĉkamparaninon, kvindekjaran avinon. La malsanulino



Huang Juhiang kaj "nudpieda kuracistino" Vang Guiĝen (la meza) kune vizitas malsanan komunumanon malriĉkamparaninon.

troviĝis en senkonsciiĝo kaj danĝero. Familianoj de la malsanulino rigardis medicinajn laborantojn per esperaj okuloj. Organizante urĝan savon per diversaj medikamentoj, Huang Juhiang pensis en si: Okazos eble akcidento, se oni akceptas kaj kuracos la pacienton maljuna kaj tre malfortan kaj en grava malsaniĝo; sed pli grava akcidento okazos rezulte de forta skuado dum transveturigo, se oni transsendas ŝin en alian hospitalon. Kion fari? Tiam eksonis granda voko al li: **"Savi mortantojn kaj helpi vunditojn, efektiviĝi revolucian humanismon!"** Li tuj ekkonsciis: oni povas malpli riski per transsendo, sed tio estas tre malfavora por la paciento kaj estas senrespondeca faro. La peniga laboro staras antaŭ ni kiel ŝarĝo defiante nin pri surŝultrigo! Huang Juhiang firme decidis preni ĝin sur siajn ŝultrojn. La familianoj de la malsanulino kuraĝigis lin: "Doktoro Huang, agu kuraĝe kaj zorgeme, venku la malsanon per la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong, sed ne estu timigata de la malsano! Se nur vi faras vian plej-ebulon, ni ne kulpigos vin, eĉ se vi malsukcesos en

kuraco. Sed ni absolute ne konsentas transsendi la pacienton." La vortoj de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj firmigis lian fidon pri ĉeloka urĝa savo. Tuj pliiĝante urĝsavajn rimedojn, li telefonis al la Ĉuanŝa-gubernia Popola Hospitalo por peti helpon de tieaj kuracistoj. La malsanulino kuŝis senkonscia tri diurnojn. Huang Juhiang gardis ĉe ŝi kaj atente flegis ŝin forgesante ripozi kaj manĝi. Dume, li petis la familianojn ripozi. Post semajno resaniĝis la paciento. Ĉe adiaŭo, tiu ĉi malriĉkamparano-avino, kiu suferis grandan mizeron en la malnova socio kaj havas grandan malamon kontraŭ ĝi, forte prenis la manojn de Huang Juhiang kaj tre emociite diris kun larmoj: "Dankon, kamaradoj, vi savis min." "Prezidanto Maŭ instruas al ni tion fari," respondis Huang Juhiang. Levinte la kapon la avino rigardis la portreton de Prezidanto Maŭ sur la muro kaj diris kun pli granda ekscitiĝo: "Ni por ĉiam aŭskultos Prezidanton Maŭ, sekvos Prezidanton Maŭ

kaj marŝos ĝis la fino sen returniĝo." Fine ŝi diris: "Kamaradoj, ni plej bonvenigas tiajn 'intelektulojn' kiaj vi!"

En la kontakto kun malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, Huang Juhiang trovis, ke ili estas respektindaj kaj amindaj en multaj okazoj. Vidinte, ke en tre streĉa tempo de somera aŭ aŭtuna rikolto malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ankoraŭ ĉiutage studas kaj aplikas kreive verkojn de Prezidanto Maŭ, li estis profunde kortuŝita kaj ankaŭ komencis persisti ĉiutage studi verkojn de Prezidanto Maŭ. La instruoj de Prezidanto Maŭ donis al li grandan politikan movforton, kaj la ekstrema respondeco kaj seriozeco de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj pri la revolucio kaj produkto kuraĝigis lin pli bone plenumi sian sanitaran kaj higienan laboron. Tial, kiel grandan rikolton li rigardis ĉiun eksterkuracejan aŭ rondiran kuracon kaj ĉiun kontakton kun malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Tio estas ekstrema ĝojo pro kiu li forgesis lacon en tagnokta laboro

kaj longa rondirado. En la lastaj jaroj, li ne ĉesis labori preskaŭ en ĉiuj festotagoj aŭ dimanĉoj. En somero, pro multiĝantaj pacientoj, li do ofte tranoktis en la hospitalo aŭ en la brigadaj kuracejoj por pli ĝustatempe eliri al kuraco aŭ akcepti malsanulojn alvenantajn por kuraco.

KULTURO DE “NUDPIEDAJ KURACISTOJ” EN PRAKTIKO

En 1965, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ elmetis la grandan alvokon **“meti la gravitan punkton de la kuraca kaj higiena laboro en la kamparon”**, kaj la komunumo aranĝis kurson de “nudpiedaj kuracistoj”. Huang Juhiang tre ĝojis aŭdinte tion. En la kontakto kun vastaj malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj li profunde sentis, kiel urĝe ili bezonas tian novtipan kuracan kaj higienan trupon! Sed, antaŭe la medicina potenco estis tenata de la plenmano da potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kiuj energie okupis sin pri “sistemigo” kaj “normigo” kaj trejnado disigante la lastan disde la aktuala vivo. Tion rimarkante, Huang Juhiang tre maltrankviliĝis kaj indignis. Li iam diris en kolero:

“Estas nepermesate puŝi gefilojn de malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj sur la malnovan vojon, oni nepre devas ŝanĝi la metodon de trejno!” Sed, kun la uzurpita potenco en la manoj la plenmano da potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon daŭre efektivigis reviziisman edukon linion intencante ruinigi gefilojn de malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj.

Dank’ al la granda proletara kultura revolucio la proletaraj revoluciuloj deprenis la potencon de kuraco kaj higieno en la kamparo. Huang Juhiang prenis sur sin la taskon trejni “nudpiedajn kuracistojn” en la duafoja kaj triafoja kurso. Li tre fervoris kaj laboris kun plena energio. Laŭ la instruoj de Prezidanto Maŭ pri eduko, li establis en du ĉambroj de malnova pajlokabano kangdaptan** kurson de “nudpiedaj kuracistoj”. De tiam aperis nova fizionomio en la kurso kaj konstante okazis spertoŝanĝaj kunsidoj pri kreiva studo kaj kreiva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ. En medicina lernado ili alprenis la formon **“Oficiroj instruu soldatojn, soldatoj instruu oficirojn kaj soldatoj instruu sin unu alian”**. Huang Juhiang sin ĵetis en la laboron kun plena entuziasmo. Li kun sia familio loĝis proksime de la kurso sed

Huang Juhiang (la meza) kuracas malsanan komunumanon malriĉkamaraninon.



li portis sian litajon en la pajlokabanon kaj dormis tie kun la kursanoj sur rizpajloj. Li konvinkiĝis, ke tio estas unike ĝusta vojo por kulturi medicinajn laborantojn en kamparo. Post trejnado la elkulturitaj “nudpiedaj kuracistoj” revenis respektive en siajn brigadojn, kaj Huang Juhiang komencis sin ĵeti en la laboron de praktika kulturo per pli multe da tempo.

Malriĉkamparanino komunumanino Giang Gujlan de Dagoŭ-brigado longe suferis de kormalsano. Huang Juhiang decidis kuraci ŝin kune kun Vang Gujĝen — “nudpieda kuracisto” de la brigado, por ke tiu ĉi havigu al si la terapion pri kormalsano en praktiko kaj samtempe por ke Giang Gujlan ricevu kuracon hejme per malpli multa elspezo.

La unuafoja kulturado per praktiko komen-ciĝis. Preninte stetoskopon, Vang Gujĝen iom embarasiĝis kun la manoj tremantaj. Huang Juhiang apude kuraĝigis: “Ne streĉu vin, atente aŭskultu.”

En la ĉambro regis kvieto. Vang Gujĝen detale notis ĉion, kion ŝi aŭdis, poste tre zorgeme preskribis. Huang Juhiang transprenis la stetoskopon kaj atente aŭskultis, faris korektojn en ŝia diagnozo kaj reviziis ŝian recepton. Dank’ al tiu ĉi praktiko, Vang Gujĝen ellernis tion, kio estas neakirebla en klasĉambro. Poste, ili kuracis alian malsanulon de la brigado suferantan de kormalsano. El tio Vang Gujĝen akiris multe pli da progreso. Nelonge poste ŝi jam povis memstare akcepti malsanulojn.

Vidinte, ke Huang Juhiang kulturis per tia metodo ilian brigadan “nudpiedan kuracistinon”, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kun granda ĝojo diris: “Tiu ĉi vojo estas ĝusta, ja estas malbone legi librojn sen praktiko!”

AKCEPTI REEDUKON FARE DE LA MALRIĈKAMPARANOJ KAJ MALSUPERAJ MEZKAMPARANOJ

Tamen, Huang Juhiang ĉiam sentas, ke kulturo en praktiko estas ankaŭ procezo en kiu li mem lernas de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj bonan kvaliton, kreive studas kaj aplikas verkojn de Prezidanto Maŭ kaj remuldas sian mondkoncepton. Lin profunde edukis la senlima amo de “nudpiedaj kuracistoj” al Prezidanto Maŭ kaj ilia profunda klasa sento al malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Foje, “nudpieda kuracisto” portis en la sino infanon al la kuracejo kaj diris ke tiu suferas epidemian meningiton. Huang Juhiang tuj kutime surmetis

izolveston kaj buŝkovrilon kaj komencis ekzamenon. Tamen, kiam li trovis senintence, ke la “nudpieda kuracisto” portas nek izolveston, nek buŝkovrilon sed premas la infanon en sia sino, li ruĝiĝis. Kiel en spegulo, Huang Juhiang vidis en la “nudpieda kuracisto” sian intelektulan mankon. Alifoje, li ŝprucigis medikamenton por ekstermi moskitojn kune kun “nudpieda kuracisto”. Kiam ili alproksimiĝis al porka stalo, de tie blovis renkonte al ili fetoro, kaj li retiris la etenditan piedon. Sed la “nudpieda kuracisto” kvazaŭ ne sentis la odoron, rapide saltis en la stalon kaj komencis ŝprucigi. Tiam Huang Juhiang tuj ekkonsciis, ke tio estas montriĝo de la burĝara ideologio. Li tuj demetis la ŝuojn, saltis en la stalon kaj ekŝprucigis kune kun ŝi. Li sentis, ke nur tiamaniere li povas vere pli unuiĝi ĉirkaŭ la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

Lastatempe, Huang Juhiang studis la plej novan instrukcion de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ: **“El la lernantoj kulturitaj de la malnovaj lernejoj, la pliparto aŭ plejparto povas sin kombini kun la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kaj iuj eĉ ion atingis en inventado kaj kreado, sed ili devas esti reedukataj de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj sub la gvido de ĝusta linio por ĝisfunde ŝanĝi sian malnovan ideologion. Tiaj intelektuloj estas bonvenaj al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.”** Tiu ĉi instrukcio de Prezidanto Maŭ donis al li grandan inspiron. Li diris: “Grandaj estas la ĉielo kaj tero, sed ne tiom kiom la bonfaro de la Partio; karaj estas la patro kaj patrino, sed ne tiom kiom Prezidanto Maŭ. Mia kresko en la batalo en la kamparo dum la lastaj jaroj tute estas procezo de nutrado de la sunlumo kaj roso de la penso de Maŭ Zedong, procezo de reeduko al mi fare de la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.” Li esprimis decidon pli sincere akcepti reedukon de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, tutkore kaj tutanime servi al ili dum la tuta vivo.

**“Nudpiedaj kuracistoj” estas intima alnomo donita de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la ŝanhaja ĉirkaŭurbo al duonterkulturaj kaj duonkuracaj sanitaristoj. Ĉi tiuj “nudpiedaj kuracistoj” plejparte estas junaj intelektuloj devenantaj el familioj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, kaj post kurta trejnado ili terkulturas kaj samtempe partoprenas preventan kaj kuracan laboron en la kamparo. Ili rikoltis rimarkindan sukceson en plibonigo de la higiena stato de kamparo kaj ĝuas bonvenigon inter malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.*

***La Ĉina Popola Kontraŭjapana Milita kaj Politika Universitato, vidu EPĈ, n-ro 2, 1967.*



Antaŭen en la Vasta Mondo!

HOŬ GJUN

EN la jaro 1962, mi finis mian studon en la supera parto de la Lianghiang-a Mezlernejo en Pekino. Responde al la granda alvoko de Prezidanto Maŭ, plena je revolucia fervoro, mi sekvis lian revolucian linion, venis al la vilaĝo Doŭgiakiaŭ en Baŭdi-gubernio por tie fikse loĝi kiel membrino de popola komunumo.

Kiel arda ja estis mia revolucia entuziasmo en la unuaj tagoj! Tamen, mi havis tiam nur deziron reformi la kamparon, sed mankis al mi spirita preteco por remuldi min mem. Sekve, miaj personaj konsideroj kaj malĝustaj pensoj tuj emerĝis, kiam mi komencis mian kamparan vivon. Ĉar mi naskiĝis kaj kreskis en urbo dorlotata ekde naskiĝo. Mi venis al Doŭgiakiaŭ ĝuste en la plej varmaj tagoj de la jaro. Sarkante kampon kune

kun aliaj komunumanoj sub la ardanta sunbrilo kaj starante sur la varmigita tero, mi sentis brulon kaj lacegon, kaj acide doloris al mi la talio kaj gamboj. Reveninte hejmen, mi ankoraŭ devis mueli grenon, prepari manĝaĵon kaj fliki vestojn. Kian signifon havas fari ĉiutage tiujn bagatelojn, mi pensadis en mi. Aŭdinte iajn kritikojn de la amaso, mi sentis grandan ofendiĝon kaj miaj okuloj estis eksaturitaj de larmoj. Tiam mi tutkore sopiregis nur forlasi plej rapide la vilaĝon kaj iri labori en iu ŝtata agrikulturejo kiel kamplaboristo.

Tre intensis mia pensbatalo en tiuj tagoj. Kun miaj vivaj pensoj mi malfermis la brilan verkon de Prezidanto Maŭ kaj miaj okuloj renkontis la vortojn: "... Aliaj montriĝas tre malmolestaj. Leginte nur kelkajn frazojn, ili jam rigardas sin tre

altaj kaj tenas la nazon supren ĝis la ĉielo. Tamen, kiam okazas ŝtormoj, ilia pozicio fariĝas tute malsama ol tiu de la laboristoj kaj la plejmulto de la laborantaj kamparanoj: la unua ŝanceliĝas kaj ambiguigas, dum la dua restas firma kaj klara.” Kvazaŭ brila lampo la trezora libro de Prezidanto Maŭ subite lumigis mian koron kaj kompare pli profunde komprenigis al mi unuafoje, ke mi ankoraŭ ne tute forlasis la arogantan sintenon de intelektuloj. Kial la komunumanoj povas tutanime penadi, senplende plenumante la malfacilajn laborojn, — mi ekcerbumis — dume mi facile ekofendiĝas, ŝanceliĝas kaj eĉ volas fariĝi dizertulo? Tio pruvas, ke troviĝas granda distanco inter mi kaj la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj en penso, sentimento kaj vivo. Konsciente tion, mi faris al mi plej firman decidon rigore reformi mian mondkoncepton, komplete ŝanĝante ĝin ĝismedole, aktive alproksimiĝi al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj modeste lerni de ili kaj kombiniĝi kun ili.



Hoŭ Gjun en laboro

Mi faris definitivan decidon hardi min en praktiko kaj aktive partopreni la produktan laboron, timante nek penadon nek laciĝon. Dum eltirado de tritiko, aperis pro frotado 7-8 sangaj vezikoj sur miaj manoj. Post kreviĝo tiuj vezikoj pike doloregis al mi ĉe ektuŝo de la tritiko. La komunumanoj tre domaĝis min kaj konsilis al mi ripozon. En tiu momento la instruo de Prezidanto Maŭ tuj venis en mian memoron: **“Se vi volas esti komprenata de la amaso kaj kunfandiĝi kun ĝi, vi devas fari decidon trapasi longan kaj eĉ doloran procezon de remuldado.”** Kaj pensante ke, la vastaj amasoj de komunumanoj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj povas tiel pene labori, monaton post monato kaj jaron post jaro, kial mi ne, mi do firme kunpremis miajn dentojn kaj daŭrigis la tiradon. Vidinte ke mi tiel energie laboras, la komunumanoj nomas min “fera knabino”. Kompreneble, tio estas por mi kuraĝigo, donita de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Sed, mi konvinkiĝis, ke sen efektiva revoluciigo de la ideologio mi ankoraŭ remoliĝos antaŭ malfaciloj.

Iufoje, subite pluvegis, mi tuj rapidis hejmen de la kampo por ĝin eviti. Sed la komunumanoj ĉiuj klopodis rapide ŝirmi la sunumatajn adobojn por la kolektivo malgraŭ la ventego kaj pluvego. Tio profunde kortuŝis min, kaj ankaŭ mi ĵetis min en la lukton kune kun ili. Kvankam tramal-

sekigitaj, ni ĉiuj intense batalis, ĝis kiam ĉiuj adoboj estis staplitaj kaj kovritaj bonorde. En tiu momento mia koro estis plena de ĝojo kaj ankaŭ de honto. En la ordinara tempo, ankaŭ mi parolis senĉese pri “zorgo al la kolektivo”, tamen efektive mi ne agis tiel en la praktiko kiel la komunumanoj. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj donis al mi vivan lecionon per sia nobla kvalito de varma amo al la kolektivo.

Dum laborado, ĉu en ŝlimo, ĉu en akvo aŭ sur kampo, la komunumanoj timas nek malpurecon nek laciĝon. Ĉion ĉi mi kaptis per miaj okuloj, kaj notis en mia memoro. Mi ĉiam prenis ilin kiel mian ekzemplon kaj lernis de ili. Iufoje, por ripari domon, mi miksis argilan stukon kune kun kelkaj komunumanoj. Kun nudaj piedoj kaj suprenfalditaj pantalonotuboj, ni laboris en fosejo. La argilo, akvo kaj ŝvito makulis niajn kapojn, sed ni ne havis tempon por iom viŝi nin. Tamen mi sentis, ke tiam miaj pensoj estas pli puraj ol iam ajn antaŭe. Mi ekkomprenis vere, ke efektiva vero estas la diro de Prezidanto Maŭ **“... ke la plej puraj ja estas la laboristoj kaj kamparanoj, kaj ke ili estas pli puraj ol la burĝaraj kaj etburĝaraj intelektuloj, malgraŭ ke iliaj manoj estas nigraj kaj iliaj piedoj surhavas bovfekajon”**.

En la komenco mi erare opiniis, ke mi havas pli altan klasan konscion ol la kamparanoj. Sed fakte la afero estas tute ne tia. La vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ne nur laboras tutkore por la kolektivo en produkto, sed ili ankaŭ estas pioniroj kaj sturmantoj en la klasa batalo. Dum la socialisma eduka movado en la kamparo, mi propraorele aŭdis la raportojn pri pasinta amaro kaj nuna dolĉo faritajn de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, ilian rakontadon de historioj vilaĝaj kaj familiaj kaj ilian akuzadon kontraŭ la krimoj de la klasaj malamikoj, kaj ankaŭ propraokule vidis, kiel ili kuraĝe malkovris fiulojn kaj malbonajn farojn kaj firme batalas kontraŭ la malnovaj ideoj kaj malnovaj fortoj. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, kiuj plej malamas la klasajn malamikojn kaj plej amas Prezidanton Maŭ, estas miaj plej bonaj instruistoj. La klasbatalo en la kamparo instruis min, plifortigis mian klasbatalan ideon, kaj multe levis mian konscion de batalo inter la du linioj. En batalkunveno mi kune kun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj faris firman batalon kontraŭ la malamikoj. Kaj mi cetere malkaŝis ties intrigojn veneni gejunulojn per flavaj legaĵoj kaj logi kadrojn per malgrandaj favoroj.

Por efektiviĝi la revolucian linion de literaturo kaj arto de Prezidanto Maŭ kaj okupi la kamparan pozicion per la revoluciaj literaturo kaj arto, ni organizis propagandan taĉmenton, kies membroj voĉlegis sur la kampoj ĵurnalojn por malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj helpis ilin studi verkojn de Prezidanto Maŭ. Ni prezentis ankaŭ memverkitajn programerojn, kiuj estis tre ŝatataj de la amasoj. Poste pli kaj pli multe da junuloj partoprenis tiujn aktivadojn, tial ni fondis ĥoran kaj artan grupojn. De tiam, ĉiam antaŭ la taga laboro aŭ kunveno kaj dum laborpaŭzoj, la komunumanoj povas ĝui niajn prezentadojn kun revolucia enhavo.

En nia vilaĝo, la salalkala tero okupis 50 procentojn de la kolektivaj agroj. "Printempe blankas alkalo prujne, kaj ŝvelas ĉie akvo aŭtune." Sur tia tero oni povas semi akurate, sed rikolti sengarantie. En ordinara jaro la pomua produktkvanto estas nur 60-70 ĝinoj. Kion fari? Mi pensis, ke la batalo kontraŭ la naturo povas esti nur amasa batalo, kaj tial estas necese mobilizi la fortojn de la amaso. Do mi interkonsiliĝis kun aliaj kaj fondiĝis sciencteknika grupo kombinita el tri flankoj de veteranaj

kamparanoj, kadroj kaj gejunuloj por decide elradiki la salalkalecon. Tion ĝismorte malamamis kaj tutforte subfosis la klasaj malamikoj. Iuj, kiuj havis konservativan penson, ankaŭ malaprobis tion. Mi pensis, ke nun la problemo estas ne nur simpla forigo de salalkaleco, sed ankaŭ klasa batalo. Por ŝanĝi la fizionomion de produkto estas necese studi la verkojn de Prezidanto Maŭ kaj reformi la penson de homoj. Ni foje-foje studis la "tri popularajn artikolojn" de Prezidanto Maŭ, prenis Daĝaj-brigadon kiel nian ekzemplon, disvolvis la spiriton de "monttranslokigo" de la Malsaĝa Avo, penege batalis tri jarojn, kaj fine sukcesis unuafoje rikolti 500 ĝinojn da maizo sur ĉiu muo de alkala tero. La komunumanoj diris: "Studante ĉiam la verkojn de Prezidanto Maŭ, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ekhavas klaran menson, akran vidon kaj firman volon; ili tenas la potencon en la manoj,

Hoŭ Gjun pretigas murgazeton.



povas do vektporti ŝarĝon mil li-ojn sen ŝanĝo de la ŝultro.”

Mi pli kaj pli profunde komprenis, ke oni povas elkulturi ruĝajn daŭrigantojn de la afero de la proletaro nur en grandaj ŝtormoj de amasaj luktoj.

Mi firme marŝis antaŭen, paŝon post paŝo, sur la vojo de kombiniĝo kun la laboristoj kaj kamparanoj, sed la klasaj malamikoj rigardis min kiel pikaĵon en la okuloj kaj dornon en la karno kaj ĉiurimede provis tiri min sur malĝustan vojon. En 1964 la kontraŭrevoluciulo Ĝou Jang persone venis al nia brigado por veneni nin. Li intencis min treni en la marĉon per famiĝo kaj profito, instigante min “verki novelojn” por realigi la tiel nomatan idealon “fariĝi verkisto” revitan en la junaĝo. Li demandis min: “Ĉu vi verkas?” “Ne,” mi respondis. Li denove demandis: “Ĉu vi ne pripensis, kiel realigi la idealon fariĝi literaturisto vivante en la kamparo?” La demando tre surprizis min, kaj mi rekte diris al li: “Ne, de la tago kiam mi venis en la kamparon, mi jam ĉesis pensi pri fariĝo de literaturisto.” Vidante ke mi ne venis en la kaptilon, li tuj kolere diris: “Sendi vin ĉi tien ja ne celis ke vi forĵetu viajn sciojn.” Li plie daŭrigis: “Ĉar vi jam kombiniĝis kun la laboristoj kaj kamparanoj kaj cetere havas praktikan sperton, vi do posedas jam kapitalon por la idealo. Skribu vian personan travivaĵon en la kamparo, tio jam estos bona verko!” Tiam mi pensis, ke la lerneja eduko donis pasinte al mi nur la pensojn de la burĝaro pri ĉaso de famo kaj profito kaj luktado por la individuaj intereso, igante min disiĝi de klasbatalo, kaj ke irante laŭ tiu vojo, mi certe glitos en la reviziisman ŝlimejon kaj fariĝos daŭriganto de la burĝaro. Mi nepre devas esti fidela al Prezidanto Maŭ, aŭskulti liajn vortojn kaj fariĝi daŭriganto de la revolucia afero de la proletaro. Mi do senŝanceliĝe respondis: “Mi scias, kio devas esti mia idealo! Fariĝi novtipa kamparano kaj servi al la popolo en la tuta vivo — jen estas mia ununura idealo!”

La kelkjara batala vivo en kamparo hardis min. Mi profunde konis ke iri labori en montaro kaj kamparo estas luma vojo, kiun Prezidanto Maŭ montris al ni, kaj kiun devas nepre trairi ni junaj intelektuloj por revoluciigi kaj laboruligi nin. Ni ŝanĝos propramane la fizionomion de la patrolando karakterizatan per malriĉeco kaj malpleneco kaj partoprenos persone la batalon por entombigi la imperiismon, reviziismon kaj reakciularon. Mi decide tenos pli alte la ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong kaj firme marŝos antaŭen sur la vojo de kombiniĝo kun la laboristoj kaj kamparanoj!

SONFORKETA HORLOĜO

Sub la aktiva kunlaboro de frataj fabrikoj, la proletaraj revoluciuloj de la Ŝanhaja Horloĝa Fabriko sukcesis fabriki antaŭnelonge la unuan sonforketan horloĝon en nia lando.

La sonforketa horloĝo estas fabrikita dank’ al apliko de moderna tekniko de elektroniko. En tia horloĝo, la sonforketa oscililo formita el sonforketo kaj transistoraj elektronaj elementoj anstataŭas balancoradon kaj balancan risorton. Ĝi havas simplan strukturon kaj estas facile fabrikebla kun malalta produkta kosto. Ekstera skuado kaj temperatura variado influas ĝin tre malmulte. Ĝi estas uzebla en aŭtoj, ŝipoj kaj aviadiloj.

661 – GLUILO POR MEDICINA UZO

Apogante sin sur la propraj fortoj, la revoluciaj laboristoj de Gajĝou-a Kemia Fabriko, Liaŭning-provinco, sukcesis fabriki la gluilon por medicina uzo: 661. Per tio ili faris kontribuon al la disvolviĝo de la medicina kaj higiena afero en nia lando. Tiu gluilo estas organika kombinaĵo. Uzante ĝin en kuracado de eksteraj vundoj aŭ en grandaj aŭ malgrandaj ĥirurgiaj operacioj por kunglui la malfermaĵon de vundo aŭ tranĉo, oni ne plu bezonas kudri kaj bandaĝi. Ĝi estas facile uzebla kaj ĝia apliko mildigas la suferon de malsanuloj. Ĝia provado al ĉirkaŭ mil pacientoj en pli ol 40 hospitaloj en diversaj lokoj montris bonan rezulton.

ALTPREMITA ANTAŬSTREĈITA FERBETONA AKVOTUBO

La laboristoj de la Ruĝflaga Fabriko de Cementaj Produktaĵoj en Hi-an antaŭnelonge sukcesis fabriki la unuan altpremitan antaŭstreĉitan ferbetonan akvotubon en nia lando, kaj per tio plie malfermis novan vojon, al la anstataŭigo de gisitaj akvotuboj per la cementaj.

Tia ferbetona akvotubo estas pli daŭrema ol la gisita de la sama normo kaj ne rustiĝas sub la tero. Ĝi ebligas ŝparon de pli ol 80% de ŝtalo. Kompare kun ordinara antaŭstreĉita ferbetona akvotubo, ĝi havas pli maldikan vandon, estas malpli peza, ne elpenetrebila por la akvo kaj pli daŭrema en uzado, ebligas ŝparon de triono de ŝtalo kaj du kvinonoj de cemento, kaj estas instalebla sen fundamentoj. Ĝi estas ne nur bona en kvalito, sed ankaŭ simpla en la teknologio, kaj tio multe rapidigas la produktadon.

Por Ĉiam Esti Lernanto de Laboristoj

CAJ MIANŜI (teknika laboranto de la Hingtaj-a Metalurgia Fabriko)

LASTATEMPE, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ profunde montris: “El la lernantoj kulturitaj de la malnovaj lernejoj, la pliparto aŭ plejparto povas sin kombini kun la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kaj iuj eĉ ion atingis en inventado kaj kreado, sed ili devas esti reedukataj de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj sub la gvido de ĝusta linio por ĝisfunde ŝanĝi sian malnovan ideologion. Tiaj intelektuloj estas bonvenaj al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.” Tio estas la plej granda zorgo, plej granda amo, plej granda instigo kaj plej granda eduko de nia amata Prezidanto Maŭ al ni junuloj.

Antaŭlonge Prezidanto Maŭ jam montris: “La laborista klaso estas la plej malproksimvida, plej malegoisma kaj plej ĝisfunde revolucia.” Tion mi profunde sentis en mia laboro.

En aŭgusto de 1961, mi finis mian studon en la Anŝan-a Metalurgia Lernejo. Mia studfako estis elektra instalado. Veninte al la fabriko, mi estis postenigita en la laborejo kiel elektristo por riparado. Pro tio mi estis multe ĉagrenita. Ĉar mi pensis, ke mi lernis multe pri elektra instalado teorie, sed en la laborejo la ekipaĵo estas simpla kaj nenio granda povas esti farita ĉi tie por plene utiligi mian kapablon.

Sed, kiel estis en efektiveco? Ĉu mia tuta “teoria” scio akirita en la lernejo vere sufiĉis en la laboro? En la praktika laborado, ĉe iuj planoj mi eĉ ne povis trovi la indikitajn objektojn. Foje, kiam mi manĝis kune kun miaj kamaradoj en laborejo, estingiĝis la lamplumo. Mi pensis, ke tion certe kaŭzas rompo de la elektra kurento. Mi tuj provis la du elektrajn fadenojn per elektroskopo kaj konstatis, ke la elektra kurento ne ĉesis. Kial do estingiĝis la elektraj lampoj? Rapide mi kuris al mia ĉambro por trovi klarigon en la libroj, sed mi nenian klarigon trovis, traserĉinte miajn libroŝrankojn. Kiam mi revenis al la laborejo, la lampoj estis jam ree lumantaj. Iu laboristo diris al mi, ke la kaŭzo de la estingiĝo de la lampoj estis rompiĝo de nulokondukilo. En

tiu okazo la maljuna laboristo Hjue Li rekte diris al mi sen ĉirkaŭfrazo: “Malgranda Caj, kial vi ne petis konsilon de ni, sed serĉis helpon en viaj libroj, kiam vi renkontis la malfacilon? Tio evidentigas, ke vi malestimas nin laboristojn kaj timas perdi vian prestiĝon. Por diri la veron, ni laboristoj estas multe pli superaj ol la eluzitaj libroj. Ni devas neniam forgesi la laboristojn. Kiu forgesas la laboristojn, tiu forgesas la revolucion kaj sian devenon...” Kaj li daŭrigis sian parolon per rakonto de la batalhistorio de la laboristoj de la fabriko. Tio tiris min al rememoro pri mia pasinteco. Mi devenas de familio de malriĉkamparano de la gubernio Penglaj, Ŝandong-provinco. En la damninda malnova socio, sub la premo de ŝuldoj, mia patro devis fuĝi al la Nordoriento, kie

Caj Mianŝi (dekstre) studas plibonigon de la maŝina ekipaĵo kune kun la laboristoj.



li paŝtis porkojn por bienulo. De tiam ni ne ricevis plu ian informon pri li. En nia familio estis 10 gefratoj, el kiuj 5 mortis pro malsato. Mia patrino iris kun ni al Dalian almozpetante. Mi propraokule vidis, kiel la kapitalisto vipis mian patrinon preskaŭ ĝis morto, kaj kiel bienulo ellasis sian hundon mordvundi miajn fratinojn tra la tuta korpo... Fine, “ruĝas la oriento, levigas la suno”, ni estis liberigitaj. La granda gvidanto Prezidanto Maŭ savis nin el la maro de amaro kaj mi havis la eblon fini la studon en faka lernejo. Sed mi malestimis la laboristojn, pensis sole pri titolo, profito kaj pozicio por mi mem, kaj ne volis fariĝi laboristo. Ĉu en tio mi povis senti min konsciencie trankvila antaŭ Prezidanto Maŭ, antaŭ la laborista klaso? ...Tio montris, ke mi estas profunde venenita de la kontraŭrevolucia reviziisma eduka linio de la ĉina Ĥruŝĉov. Kune kun la maljuna laboristo Hjue Li, mi studis la instruon de Prezidanto Maŭ **“La fina dividlinio inter revoluciaj intelektuloj kaj nerevoluciaj aŭ kontraŭrevoluciaj intelektuloj estas, ĉu ili volas kaj praktikas kombiniĝon kun la laboristaj kaj kamparanaj amasoj.”** Dank’ al tio mi pli profunde ekkomprenis la grandan signifon de la kombiniĝo de intelektuloj kun la laboristoj kaj kamparanoj. Starante antaŭ la portreto de Prezidanto Maŭ mi ĵuris: “Ho Prezidanto Maŭ, Prezidanto Maŭ! Mi ĉiam sekvos vin. Mi definitive iros la de vi montritan vojon de kombiniĝo de intelektuloj kun la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj senŝanceliĝe en ventegoj kaj ondegtoj.”

Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, mi komencis interŝanĝi korfundajn sentojn kun la laboristoj, studis kune kun ili la verkojn de Prezidanto Maŭ, kaj meminciate malkovris miajn egoismajn pensojn por akiri ilian helpon, tuj kiam mi havis tempon, kaj mi senĉese progresis en la penso.

Dum la lastaj 7 jaroj, strikte laŭ produktaj bezonoj mi faris kune kun la laboristoj pli ol 20 kompare grandajn teknikajn renovigojn kaj solvis ŝlosilajn problemojn en la produktado. Dume, la potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj la burĝaraj teknikaj “aŭtoritatuloj” de la fabriko ne zorgis la ekipaĵojn en laborejoj, kaj eĉ instalas ekipaĵon, kiu minacis la vivon de la laboristoj pro manko de sufiĉa laborekseco. Kune kun la laboristoj mi malkovris ilian intrigon trompi la laboristojn per ĵonglado de teknikaj preparoloj.

En la jaro 1963, aperis nova demando en la elektra ekipaĵo de la 50-tuna argano, la ĉefa instalaĵo en la laborejo de gisado, pro troa funkciado kaŭze de senĉesa kreskado de produkta kvanto. Kelkaj elektraĵoj estis difektitaj


brule kaj unu nova elektra motoro difektiĝis denove post uzado en malpli ol du semajnoj. La produktado estis rompita. Vidinte la difektitajn motorojn kaj la skuiĝantan korpon de la argano, la kamaradoj laboristoj estis tre maltrankvilaj. Iu maljuna laboristo diris al mi: “Malgranda Ĉaj, la tuta kompleto de projekto farita de la burĝaraj ‘specialistoj’ jam tute ne povas respondi al niaj produktaj bezonoj. Prezidanto Maŭ montris al ni, ke ni devas apogi nin sur la propraj fortoj. Prefere, ni mem elhaku al ni novan vojon.” La laborejo transdonis tiun proponon al la administracio de la fabriko. Ĝi kolerigis, ekster nia supozo, la potenctenantojn irantajn la kapitalisman vojon kaj la burĝarajn teknikajn “aŭtoritatulojn”, kiuj skuante siajn kapojn diris: “Simple stultaĵo! Ĉu vi ne scias, ke la ekipaĵo estas de ‘internacia normo’ projektita en eksterlando? Neniu rajtas ŝanĝi ĝin je iometo sen nia permeso.” Ni tute ne aŭskultis ilian sensencaĵon. En la laborejo ni ripetade studis la instruon de Prezidanto Maŭ **“sinapogi sur la propraj fortoj”**, kaj sub la apogo de kamaradoj laboristoj mi detale informiĝis pri la konkreta stato, renkontata de laboristoj en manipulado. Surbaze de tiuj informoj, mi faris atentan observadon en laborejo, notis ĉiujn konkretajn demandojn kaj studis ilin kune kun la laboristoj en kunveno. La kolegoj varme subtenis kaj helpis min solvi la malfacilajn demandojn unun post alia. Ekzemple, kiam la kontrolilo ne taŭgis, ni plibonigis ĝin propramane. Kiam mankis rezistilo, oni riparigis kaj utiligis iun ĵetitan. Tiamaniere, la nove reformita argano rapide komencis funkcii en la produktado. Dum la lastaj 5 jaroj, ne okazis bruldifektiĝo al la elektraĵoj motoroj, ĉesis skuiĝi la korpo de la argano kaj multe altiĝis la produktiveco. La taga kvanto de transportado de la argano altiĝis 1.5-oble pli ol en la pasinteco kaj neniu akcidento okazis. La manipulistoj estis tute kontentaj pri ĝi. La sukceso de tiu teknika renovigo donis fortan rebaton al la sensencaĵo de la ĉina Ĥruŝĉov pri “administrado de la fabriko per specialistoj” kaj donis fortan vangfrapon ankaŭ al la potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj la reakciaj teknikaj “aŭtoritatuloj” en la fabriko.


El la pli ol 20 teknikaj renovigoj, mi profunde ekkonis ke **“... se la intelektuloj ne kombinas sin kun la laboristaj kaj kamparanaj amasoj, ili sukcesos en nenio.”** La intelektuloj povos komplete reformi sian malnovan mondkoncepton, kombini teorion kun la praktiko kaj fari kontribuojn al la popolo, nur kiam ili kombinos sin kun la laboristoj kaj kamparanoj.

La Nankina Pontego Interligas la Du Bordojn de Jangzi-rivero




“Vivu Prezidanto Maŭ!” varme huraas la armeanoj kaj popolanoj, kiam la trajno trapasas la nove konstruitan Nankinan Jangzi-pontegon.






La Nankina Jangzi-pontego en nokto



La penso de Maŭ Zedong estas la fonto de senlima forto kaj saĝo de la laborista klaso. La pontkonstruaj laboristoj legas serioze la *Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong*.


La pontkonstruaj laboristoj kaj la armeanoj kaj popolanoj en Nankino solene kunvenas por varme celebri la inaŭguron de trajna komunikado de la Nankina Jangzi-pontego.



Memkonscie Akcepti Reedukon de la Laborista Klaso

ĜOŬ JONGGIE

(teknika laboranto de la konstruejo
de la Nankina Jangzi-pontego)



Laboristoj kaj revoluciaj teknikistoj partoprenantaj la konstruadon de la ponto forjetis la rutinajn regulojn de la burĝaraj "specialistoj" kaj "aŭtoritatoj", kaj mem eltrovis en praktiko tutan kompletan de nova tekniko por produktado de antaŭstreĉitaj ferbetonaj traboj por larĝa spando.

MI naskiĝis kaj kreskis en familio de laborulo. Post la Liberiĝo la Partio kaj popolo kulturis min, kaj diplomite en 1963 el la Vuhan-a Ponta Kolegio, mi estis asignita al la konstruejo de la Nankina Jangzi-pontego por lerni en praktikado. En la praktikado mi iom post iom starigis amikecon kun la laboristaj amasoj. Sed, obstine antaŭenpuŝante la kontraŭrevolucionan reviziisman linion de la ĉina Ĥruŝĉov, la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj la burĝaraj teknikaj "aŭtoritatoj" plenergie koruptis junulojn per logo de titolo, profito kaj alta ofico. Ili ofte diris al la praktikantoj: "Toleru tri jarojn kiel teknika laboranto por deĵorado, gustumante iom maldolĉon, kaj vi povos jam fariĝi inĝenieroj." "En la konstruejo de la Nankina Pontego, oni estonte promocios nombron da laborantoj al inĝenieroj,

ĉio dependas de viaj kapabloj." Sub la atako de iliaj sukertegitaj obusoj komencis ŝanĝiĝi mia penso. Mi sentis, ke mi ĉiam restas ĉe la konstruejo, tio ne estas multpromesa kaj ne povas havigi al mi multajn sciojn. Kaj iom post iom mi fermis min en ĉambro, kolektis materialojn, kaj pene maĉis fremdan lingvon, opiniante ke mi estos kompetenta kaj havos perspektivojn, nur kiam mi fariĝos inĝeniero.

Kiam la burĝaro tiris min al la devia vojo de reviziismo, kamaradoj laboristoj kun forta proletara sento diris al mi: "Malgranda Ĝoŭ, kial ni ne vidis vin ĉe la konstruejo en lastaj tagoj? Ne sidu longe en la oficĉambro kaj gardu vin de degenerado...." La akraj sed elkoraj vortoj de la laboristoj trafis rekte mian vundpunkton kaj sonis al mi kiel alarmo. Tiam mi denove studis la

instruon de Prezidanto Maŭ: “. . . se la intelektuloj ne kombinas sin kun la laboristaj kaj kamparanaj amasoj, ili sukcesos en nenio.” La instruo de Prezidanto Maŭ montris al mi la direkton. Mi faris firman decidon rompi la katenon de la penso pri titolo kaj profito de la burĝaro, persisti en la vojo de kombiniĝo kun laboristoj kaj kamparanoj, kaj ne timi koton kaj olemakulon por ke mi fariĝu vera revoluciulo. Kvankam mi tiam estis transpostenigita en la oficejon, tamen, mi plejeble kaptis ĉiun troveblan tempeton por partopreni fizikan laboron de la konstruejo kaj lerni de la laboristoj.

Tre longaj estas la alkondukaj pontoj fervoja kaj ŝosea de la Nankina Jangzi-pontego, kaj la tasko de enbato de fostoj estis ekstreme peza kaj komplika. La teknologio de fostenbato antaŭe difinita rutine en fermita ĉambro surbaze de fremdlandaj materialoj serioze disiĝis de la efektiva stato de nia lando kaj ne povis solvi la problemojn. Kiam en konstruado oni renkontis multajn malfacilojn, la t. n. “specialistoj” kaj “aŭtoritatoj” forpuŝis la problemojn unu al alia, tiel ke la malfaciloj longe ne povis esti solvitaj. Tio multe influis la konstruan laboron. Post kiam nia bazfosta grupo de alkondukaj pontoj venis al la konstruejo kaj laboris kune kun la laboristoj, sub la helpo kaj direkto de la laboristoj kaj surbaze de la spertoj de veteranaj laboristoj, kiuj longe laboris en tiu fako, ni resumis kompletan da spertoj tre efikan por fostenbatado. Dank’ al tio rimarkinde leviĝis la laborefiko kaj kreiĝis favoraj kondiĉoj por sukcesa plenumo de la kolosa tasko de bazaj fostoj de la alkondukaj pontoj.

En partopreno de la konstruado de la Nankina Pontego, kvankam mi estis iom hardita, tamen mi devas ankoraŭ pluapaŝe remuldi ĝisfunde mian mondkoncepton. Mi decidis konscie akcepti reedukon de la laborista klaso kaj forĝi min en firman revolucionan batalanton de la proletaro, sub la direkto de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ.



Venke Finkon

Parto de

EN la 1-a de oktobro 1968, la fervoja parto de nia tria pontego super Jangzi-rivero — la Nankina Jangzi-pontego estas venke konstruita kaj inaŭgurita al trafiko. Ĝi estas la plej granda moderna ponto mem projektita kaj mem konstruita de la laborista klaso de nia lando dank’ al disvolvo de la proletara revolucia spirito de sinapogo sur la propraj fortoj; ĝi estas alia brila frukto de la granda proletara kultura revolucio!

La finkonstruo kaj malfermo al trafiko de tiu fervoja parto de la Nankina Jangzi-pontego plie fortigis la trafikajn interligitecon de norda kaj suda Ĉinio kaj havas gravan politikan, ekonomian kaj strategian signifon.

La Nankina Jangzi-pontego estas duetaĝa kaj dulinia ponto fervoja kaj ŝosea kun totala longeco de pli ol 6,700 metroj. Por trairi ĝin piede, komencante de ĝia alkonduka ponto, oni bezonas pli ol unu horon. La gigantaj ŝtalaj traboj de la pontego kuŝas alte super la rivero sur naŭ pilieroj kolose starantaj en la rivero. Nun la konstruado de la fervoja parto estas jam kompletigita kaj la ŝosea parto estas en intensa konstruado. Super la majestaj pontokapoj starantaj ĉe ambaŭ finoj de la ponto flirtas po tri ruĝaj flagoj okulfrape brilaj kaj sur ambaŭ flankoj de la pontokorpo mem alte pendas po 10 ĉinaj ideogramoj tre grandaj kaj ruĝe brilantaj, nome (en Esperanto): “Vivu la granda gvidanto Prezidanto Maŭ”, kiuj esprimas la senliman amon kaj fidelecon de la laborista klaso de nia lando al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, al la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong kaj al la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

Nankino situas ĉe la malsupra baseno de Jangzi-rivero. Tie la rivero estas larĝa, profunda kaj furioza, la subakva geologia stato estas tre komplika, kaj cetere ofte okazas atakoj de tajfunoj de la marbordo kaj tajdoj de la maro. Antaŭ la Liberiĝo, la japana imperiismo kaj la usona imperiismo ambaŭ provis konstrui tie pontegon por

struiĝis la Fervoja


la Nankina Jangzi-pontego

intensigi sian prirabon al la ĉina popolo. Sed, fronte al la komplikaj geologia kaj hidrologia stato tie, ili povis nur konkludi ke konstrui ĉi tie ponton estas pli malfacile ol surgrimpi la ĉielon. Post la Liberiĝo, sekvante la grandan instruon de Prezidanto Maŭ “**sinapogi sur la propraj fortoj**”, la leviginta ĉina laborista klaso decidis, post la sukcesa konstruado de la du pontegoj super Jangzi-rivero respektive en Vuhan kaj en Bajŝatuo de Ĉongking, konstrui la trian en Nankino, kie laŭ la aserto de la imperiismaj profetoj estas ne eble konstrui ponton. La ponto estas projektita, konstruita kaj

instalita tute de ni mem, sen helpo de iu ajn fremdulo kaj sen uzo de iu ajn importita ekipaĵo. Tio malfermis novan eraon de memstara konstruado de granda ponto en nia lando kaj estas granda iniciato en la pontokonstrua historio de la mondo.

Dum konstruado de la Nankina Jangzi-pontego furioze antaŭenpuŝante la kontraŭrevolucion reviziisman linion, la ĉina Ĥruŝĉov kaj liaj agentoj lasis la burĝarajn teknikajn “aŭtoritatojn” teni la gvidan potencon en tekniko. En la granda proletara kultura revolucio, plene ludante la grandan rolon de gvida klaso, la pontokonstruantaj laboristoj

La pasaĝeroj sur la vagonaro, kiu la unua trapasas la pontegon, varme akklamas la novan grandan venkon de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ.




kune kun la revoluciaj kadroj kaj revoluciaj teknikaj laborantoj kaj sub la helpado de komandantoj kaj batalantoj de PLA, alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong kaj strikte sekvante la grandajn strategiajn dispoziciojn de Prezidanto Maŭ, post ripetada kaj intensa luktado, plene frakasis la kontraŭrevolucionan reviziisman linion antaŭenpuŝitan de la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj la burĝaraj teknikaj "aŭtoritatoj" kaj la kriman intrigon de plenmano da klasaj malamikoj, kiuj senskrupule provis subfosi la konstruan laboron de la ponto, kaj finkonstruis ĝian fervojan parton antaŭ la planita dato.

Dum konstruado de la pontego, la laboristoj en diversaj lokoj kun heroa volo kaj alta aspiro

por la gloro de Prezidanto Maŭ kaj la patrolando disvolvis sian altan devsenton de mastro kaj faris grandajn kontribuojn por rapida konstruo de la pontego. La laboristoj de la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio sukcesis en provado kaj produktis la ŝtalon kun alta forteco speciale uzatan por ponto-konstruo kaj per tio frakasis la subfosan intrigon de la sovetunia reviziismo per nelivero de bezonata ŝtalo. La laboristoj de la Ŝanhajguan-a Pontotraba Fabriko tagnokte laboris por garantiĝi la fruan finkonstruon de la Nankina Jangzi-pontego kaj ĝustatempe liveris la bezonatajn trajojn. La laboristoj de iuj kemiaj fabrikoj en Tiangin, Liaŭning k. a. sukcesis fabrikigi novan lakon por ŝtalaj trajoj kiu en uzado validas por pli ol 12 jaroj. Ankaŭ la laboristoj en Pekino, Ŝanhajo, Vuhan kaj Giangsu senescepte faris sian kontribuon por la konstruado de la Nankina Jangzi-pontego.

La Nankina Jangzi-pontego en konstruado



Elhako de Nova Vojo de Profunda

Subakviĝo

Sudborda skafandrista grupo de la Nankina Jangzi-pontego

NI estas ordinara laborgrupo en konstruado de la Nankina Jangzi-pontego. Ni elhakis novan vojon por la skafandrista afero de nia lando en la batalo por konstrui la pontegon.

Nia tasko postulas skafandristojn profunde subakviĝi al tre profunda fundo de rivero por ekzameni la staton de la bazoj de pilieroj, forigi rokrompaĵojn k.s. Pro la granda profundeco, rapida fluo de la rivero kaj la granda vento kaj ondegoj ĉe ĝi, subakvaj konstrulaboroj estas tre penigaj kaj komplikaj, kaj profunda subakviĝo estas unu el la grandaj malfacilaj problemoj en la konstruado de la pontego. Laŭ materialoj en- kaj ekster-landaj, skafandristo uzanta ordinaran ekipaĵon povas atingi en sekureco nur 30-40 metrojn sub la akvosurfaco. Tio jam estas la maksimuma limo por skafandristoj. Tamen niaj kamaradoj en la laborgrupo diris: “Pro la gloro de Prezidanto Maŭ kaj pro la longdaŭra sekureco de la pontego, ni nepre venku ĉian ajn malfacilegon.” La tuta grupo el kelkdek personoj komencis la laboron de profunda subakviĝo en unu animo, disvolvante la sentiman revolucion spiriton de la laboristaro timi nek penadon nek morton, sub la helpo de niaj samsanguloj-PLA-anoj kaj plenforta kunlaborado de la frataj laborgrupoj. Ni profunde komprenis, ke por elhaki nian propran vojon de profunda subakviĝo estas necese bone forĝi nin en la baza tekniko. Por forĝi sin en tekniko, oni devas antaŭ ĉio forĝi sin en ideologio; arminte sian kapon per la penso de Maŭ Zedong, oni povas krei ĉian ajn miraklon en la mondo! Sekvante la instruon de Vicprezidanto Lin Biaŭ preni la “tri popularajn artikolojn” de Prezidanto Maŭ kiel devizon, ni ilin legas ĉiutage, kaj lernas

kaj studas ilin ĉiam, kiam ni renkontas malfacilojn. Komence kiam ni proponis fari eksperimentojn pri profunda subakviĝo per niaj memelpensitaj metodoj, la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon ne nur ne donis subtenon, sed, male, eĉ faris riproĉojn. Ankaŭ la burĝaraj teknikaj “aŭtoritatoj” kriaĉis: “Tia metodo ne havas precedencon en nia lando, nek estas notita en eksterlandaj literaturoj.” Sed, firme tenante la grandan instruon de Prezidanto Maŭ en nia memoro ke **“ĉiu ajn novaĵo trapasas malfacilan kaj zigzagan vojon en sia kreskado”**, ni faris pinto-kontraŭ-pintan lukton kontraŭ ili, kaj firme iris la vojon de neniu iritan antaŭe kaj entreprenis aferon, kiun ne sukcesis fari la antaŭuloj.

En la serĉado de nova vojo de profunda subakviĝo, ni disvolvis luktojn unu post alia kontraŭ la malbona natura medio. Kiam reduktiĝis la premo dum leviĝo en la akvo, ofte aperis tre granda temperatura diferenco, kaj la subakvismo jen ŝvitis tra la tuta korpo, jen tremis per la tuta korpo pro malvarmo. En vintro, la riverakvo estas des pli ĝisoste frosta, kaj dum profunda subakviĝo facile okazas azota anestezo. Tiam kamaradoj ekstudis la instruon de Prezidanto Maŭ **“Kio estas laboro? Laboro estas batalo. En tiuj lokoj estas malfaciloj kaj problemoj, kiuj bezonas esti solvataj de ni. Ni iras tien labori kaj batali por solvi la malfacilojn. Bona kamarado estas tiu, kiu deziras iri des pli tien, kie la malfaciloj estas ju pli grandaj.”** La instruo de Prezidanto Maŭ kreskigis al ni neelĉerpeblan forton. En la bataloj kontraŭ inundoj kaj urĝaj danĝeroj kaj por ebenigi rokon, forigi obstaklojn, esplori riverfundon kaj blokadi la fluantan sablon, ĉiuj brave sturmis antaŭen kaj neniu volis esti postĝinta.

En la lukto por trovi novan vojon de profunda subakviĝo, ni, unuflanke, disvolvis la revolucion spiriton de la ĉina laborista klaso kuraĝe pensi kaj kuraĝe agi kaj, aliflanke, ankaŭ faris sciencajn eksperimentojn, starigante nin sur solida grundo. Ni koncentris ĉies saĝon inter ni por solvi teknikajn malfacilojn. Iufoje, dum la konstruado de iu piliero, aperis sablobolo, kaj la burĝaraj akademiaj "aŭtoritatoj" ne povis trovi solvon. Kiam la kamaradoj de nia laborgrupo informiĝis pri tio, la grupestro Song Venfu tuj kunvenigis ĉiujn por studi verkojn de Prezidanto Maŭ kaj okazigis grupan kunsidon por diskuti la aferon. En tiu kunsido ni elpensis la rimedon de elektra veldo sub la akvo kaj dank' al tio la fluanta sablo estis sukcese blokadita. En la procezo de elhako de nova vojo de profunda subakviĝo aperis multaj vivaj ekzemploj, kiuj montris, ke armita per la penso de Maŭ Zedong, la ĉina laborista klaso havas senliman kreaŭton povon, kaj ke ĝi estas ne nur sturmanto en revolucio kaj produkto, sed ankaŭ mastro de la scienco kaj tekniko.

Skafandristo Hu Baŭling (la meza) kaj liaj samgrupaj batalamikoj kontrolas la preparajn laborojn de la netigo de la roko por bazo de piliero.



KONTRAŬRUSTA PAPERRO

Disvolvante la revolucion spiriton de kuraĝa penso kaj kuraĝa ago, la revoluciaj laboristoj kaj teknikistoj de la Vuhan-a Ĝenerala Papera Fabriko sukcesis post provado fabriki kontraŭrustan paperon kaj komencis ĝin produkti. Tia papero estas nova kontraŭrusta materialo uzata en multaj modernaj industriaj branĉoj. La kontraŭrusta kvalito de tiu papero produktita de la supredirita fabriko atingis la internacian nivelon, kaj ĝia prova uzado pruvas, ke ĝia kvalito estas pli bona ol kontraŭrusta oleo, kun pli longdaŭra efikperiodo ol la lasta kaj estas facile uzebla.

NOVA TEKNOLOGIO DE PRODUKTADO DE FOSFORA STERKO

La laboristoj de la Fosforsterka Fabriko de Zijang-gubernio, Siĉuan-provinco, sukcesis krei kune kun revoluciaj teknikistoj novan teknologian fluon ebligantan la utiligon de malriĉa fosforminaĵo por produkti fosforan sterkon. La kalcio superfosfata tiamaniere produktita havas pli altan entenon de efika fosforo. Per tiu teknologio, la laborforto povas esti multe ŝparita, la laborkondiĉoj multe pli bonigitaj, kaj la produkta periodo mallongigita.

La praktika uzo de tia fosfora sterko en la kamparo pruvas, ke ĝia efiko estas tre bona, kaj tial ĝi trovas bonan akcepton ĉe la vastaj amasoj de kamparaj komunumanoj.

UNIVERSALA ALTFREKVENCA ALTERNA-KURENTA VELDMAŜINO

La laboristoj kaj revoluciaj teknikistoj de la Elektromotora Fabriko de Antu-gubernio, Gilin-provinco, projektis kaj fabrikis memstare universalan altfrekvencan alterna-kurentan veldmaŝinon kun internacie progresinta nivelo. Tia veldmaŝino estas facile manipulebla kaj ebligas firman veldon. Ĝia produkta kosto estas malalta, sed ĝia laborefiko estas granda kun vasta uzebleco, kaj per ĝi oni povas veldi kolormetalajn aŭ alojŝtalajn objektojn de diversa normo kun dikeco de malpli ol 1 mm. kaj lakitajn, rustiĝintajn aŭ pro varmego facile fandeblajn objektojn.

Kanto de Pontlaboristoj

VEJ ZEJU (laboristo)

*Super Jangzi helas sun' matena lumŝprucanta,
Ore brilas kvarvoluma la libro-trezoro.
Grandan ponton ni konstruas, ondojn surpaŝante,
Jen al la brokata land' aliĝas plia floro.*

*Por konstruo de l' pontego ardas nia volo,
Sinapogo sur si mem — jen estas nia vojo.
Por ke super la rivero granda pont' aperu
Fluu nia ŝvit' torente, eĉ boaton levu.*

*Sub la sonoj de nitiloj ekskuas la tero,
Ambaŭ bordojn interligas nun la pont' giganta.
La pontlaboristoj marŝas ĝoje kun fiero,
Ĉar la prafoseg' fariĝis jam vojego glata.*

Firme sekvante la grandajn strategiajn dispoziciojn de Prezidanto Maŭ, la pont-konstruantaj laboristoj disvolvas revolucion amasan kritikon sur la konstruejo.



Verkoj de Maŭ Zedong

Broŝure Eldonitaj en Esperanto

(Parto de la Verkoj en la Periodo 1926—1941)

Analizo de la Klasoj en la Ĉina Socio	24 pĝ.
Pri Korekto de Eraraj Ideoj en la Partio	28
Kontraŭ Libroadorado	20
Zorgu la Vivon de la Amasoj, Priatentu Metodojn de Laboro	16
Pri Praktiko	32
Pri Kontraŭdiro	68
Kontraŭ Liberalismo	12
La Situacio kaj Taskoj en la Kontraŭjapana Rezistmilito post la Falo de Ŝanhajo kaj Tajjuan	32
Strategiaj Problemoj en la Kontraŭjapana Gerila Milito	72
La Rolo de la Komunista Partio de Ĉinio en la Nacia Milito	40
La Problemo de Sendependeco kaj Memstareco en la Unuecfronto	16
Problemoj de Milito kaj Strategio	40
La Direkto de la Junula Movado	24
Esti Oponata de la Malamikoj Estas Afero Bona sed Ne Malbona	8
Inaŭguraj Vortoj por <i>La Komunisto</i>	28
La Ĉina Revolucio kaj la Komunista Partio de Ĉinio	72
Pri Nia Politiko	24

Eldonitaj de la Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio
Distribuas la Libro servo de Ĉina Esperanto-Ligo
P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

Kuraĝiga kaj Ĝojiga Novaĵo

EN la triumfa kanto pri la decida venko de la granda proletara kultura revolucio, el la Fremdlingva Eldonejo de Pekino venis kuraĝiga kaj ĝojiga novaĵo: surbaze de eldonado de la *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* kaj multaj aliaj verkoj de Prezidanto Maŭ en esperanta traduko en apartaj eldonoj en 1967, aperis *Prezidanto Maŭ Zedong pri Popola Milito* kaj ĉirkaŭ 30 verkoj de Prezidanto Maŭ en novaj apartaj eldonoj en 1968.

La plejparto de la nove eldonitaj verkoj estas brilaj verkoj skribitaj de la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ dum la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito. Ili inkluzivas la verkojn *Strategiaj Problemoj en la Kontraŭjapana Gerila Milito*, *La Rolo de la Komunista Partio de Ĉinio en la Nacia Milito*, *Problemoj de Milito kaj Strategio*, *Kontraŭ Partia Stereotipaĵo*, *La Direkto de la Junula Movado* ktp. Interalie troviĝas la brila verko *Pri Korekto de Eraraj Ideoj en la Partio*, kiun kamarado Maŭ Zedong skribis dum la periodo de la Unua Enlanda Revolucia Milito, kaj ankaŭ tiuj skribitaj dum la Tria Enlanda Revolucia Milito *Pri la Ĉongking-a Intertraktado*, *Parolado en Konferenco de Kadroj en la Ŝanhi-Sujjuan-a Liberigita Regiono* ktp.

Inter ĉi tiuj nove eldonitaj verkoj estas ankaŭ *Pri la Problemo de Agrikultura Kooperigo*, kiun Prezidanto Maŭ skribis en 1955, kaj *Unuiĝu la Popoloj de la Tuta Mondo por Frakasi la Usonajn*

Agresantojn kaj Ĉiujn Iliajn Lakeojn — kolekto de kvar deklaroj kaj du paroloj kiujn Prezidanto Maŭ faris de 1963 ĝis 1965 en subteno al la revoluciaj popoloj de la mondo kontraŭ la usona imperiismo.

En tiuj brilaj verkoj Prezidanto Maŭ kreive kombinis la universalan veron de marksism-leninismo kun la konkreta praktiko de la ĉina revolucio, plenameplekse heredis kaj disvolvis marksism-leninism-on, kaj levis ĝin al tute nova stadio.

La esperanta traduko de la verkoj de Prezidanto Maŭ estas varme bonvenigata de la diverslandaj progresemaĵoj esperantistoj, kaj ili skribis unuj post aliaj por mendo. Ekde la granda proletara kultura revolucio la distribua kvanto kaj la distribua sfero de la esperantaj eldonoj de la verkoj de Prezidanto Maŭ en la mondo superas tiujn de ĉiu ajn periodo de la pasinteco. Multaj esperantistoj deziras mendi ne nur la eldonojn en Esperanto, sed ankaŭ tiujn en la angla, franca, itala, rusa, germana kaj ĉina lingvoj de la verkoj de Prezidanto Maŭ. Post ricevo de la verkoj de Prezidanto Maŭ multaj legantoj skribis al ĉinaj kamaradoj por esprimi sian ĝojon. Leganto de Francio skribis: “Kun nepriskribebla ĝojo mi ricevis la ruĝan libron *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*. Akceptu plej sinceran dankon! Legi kaj studi tiun libron estas vera ĝojo.” Post ricevo de la verkoj de Prezidanto Maŭ longe atenditaj, ĉeĥoslovaka esperantisto skribis kun ĝojo: “Nun mi povas

pli bone koni kaj studi la ĉiamvenkan grandan penson de komunismo — la penson de Maŭ Zedong.”

En siaj leteroj multaj progresemaĵoj esperantistoj alte taksis la gravan signifon de eldonado de la verkoj de Prezidanto Maŭ en esperanta traduko. Sveda leganto montris en sia letero: “Per la kontinua eldonado de la verkoj de Maŭ Zedong en Esp. via eldonejo forte kontribuas al levo de la ‘reala konscio’ de la progresemaĵoj esperantistoj al pli alta ŝtupo kaj al komprenigo pri la praktika movado por ĉie restarigi marksism-leninism, kiu fariĝis falsigita kaj fuŝita.” Ĉeĥoslovakaj esperantistoj skribis: “Ni alte taksas la klopodon de la Fremdlingva Eldonejo en la propagando de la penso de Maŭ Zedong”, “La verkoj de Maŭ Zedong donis al ni armilon por batalo.”

Post ricevo de la verkoj de Prezidanto Maŭ multaj esperantistoj komencis seriozan studon. Ili skribis unuj post aliaj por sciigi pri siaj komprenoj. Albana leganto skribis, ke post ricevo de la *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* li estis tre kontenta kaj tuj komencis legi ĝin. Li diris: “Ĝi jam fariĝis gvidilo por mia ĉiutaga vivo kaj laboro.” Angla esperantisto metis la ruĝan libreton sur tablo apud sia lito kaj persistas finlegi unu ĉapitron antaŭ endormiĝo ĉiutage. Japana instruisto prenas *Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong* kiel lernolibron, kaj ĝi estas bonvenigata de la lernantoj. Sveda leganto skribis: “La broŝurojn mi kun kreskanta intereso legadas kaj konstatas, ke la enhavo estas tre instruiga kaj nepre necesa por homoj kies mondkoncepto estas por socialismo. Kiel klara kaj bildiga estas la lingvo de Maŭ Zedong. Politikulo kaj teoriulo, kiu per simplaj vortoj kapablas doni siajn instruojn kaj analizojn al ordinaraĵoj homoj, estas tre laŭdinda homo. Tia persono estas Maŭ Zedong. Eĉ la plej simpla homo povas sekvi kaj kompreni liajn analizojn. En siaj broŝuroj li parolas al la leganto kiel kamarado al kamarado. Liaj argumentoj, priskriboj kaj klarigoj estas definitive konvinkaj.”

La revolucia entuziasmo de la diverslandaj progresemaĵoj esperantistoj, kiuj varme amas la penson de Maŭ Zedong kaj diligente studas la verkojn de Prezidanto Maŭ, senĉese kuraĝigas la kamaradojn de la Fremdlingva Eldonejo. Kun pli alta revolucia entuziasmo ili nun aktive sin okupas pri laboro de tradukado de la aliaj verkoj de Prezidanto Maŭ en Esperanto kaj diligente laboras por pli bone propagandi la penson de Maŭ Zedong en la nova jaro.

GIADONG:

Nova

LA senprecedenca, granda proletara kultura revolucio faras la paŝtan regionon de nia lando pli pompa kaj pli aminda. Antaŭ nelonge ni vizitis iun ordinaran popolan komunumon en Hinjuan-gubernio de Jilia Kazaĥa Aŭtonoma Subprovinco, la Hingianga Ujgura Aŭtonoma Regiono — la popolan komunumon “Ruĝa Stelo” kaj vidis ke ĉie montriĝas revolucia vigleco kaj brutara prospero.

KABO-A PAŜTEJO

Iun serenatan matenon, ni iris al la Kazaĥa Stepo ĉe la rivero Kabo, kie la paŝtaj brigadoj de la komunumo havas siajn paŝtejojn. Ni iris al Tianŝan tra montgorĝo sudoriente de la komunumo. La tero iom post iom estis pli alta kaj la neĝkovritaj montpintoj de Tianŝan fariĝis ĉiam pli proksimaj. Kiam ni atingis la Kabo-an paŝtejon post transgrimpo de kelkaj montoj, la suno jam kliniĝis al la okcidenta montpinto. De la montsupro ni vidis antaŭ ni la riveron Kabo serpentumantan foren sub la brilo de la subiranta suno kvazaŭ oran rubandon. Malsupre de la neĝlinio de Tianŝan troviĝas praarbaro nigre verda, kaj multaj blankaj feltaj ĵurtoj (tendoj de nomado) stariĝas sur la flave verda herbejo. Kazaĥaj paŝtistoj postkuras sur fortaj ĉevaloj siajn grasajn gregojn sur la stepo. Famaj kazaĥaj ĉevaloj aŭ paŝtas sin, aŭ henas aŭ kuras fluge kun hirta vosto. Prospero regas sur la paŝtejo.

La vasta somera paŝtejo etendiĝas tre tre foren.

Tamen, antaŭ la Liberiĝo, la bonaj naturaj kondiĉoj tiel favore dotitaj alportis neniam da feliĉo aŭ ĝojo al la vastaj mizeraj paŝtistaj amasoj. Sub la longdaŭra kruela regado de la kuomintangaj reakciuloj, la paŝtistoj migradis tra la tuta

Fizionomio ĉe la Rivero Kabo

jaro por trovi akvon kaj herbaron, kun neniu fiksa paŝtejo, nek staloj kaj herbaj bazlokoj, kaj vivis treege mizere, kiel priskribis jene la siatempe cirkulanta popolkanto:

*Sennombraj kvazaŭ stepaj herberoj
Sur nin povrulojn pezas mizeroj.*

*Kaj kiel Kabo senfine fluas,
Nia larmad' ĉiam kontinuas.*

. . .

Tiu estis Prezidanto Maŭ, la granda savanto de diversnaciecaj popoloj, kiu savis la mizerajn paŝtistojn el la maro de amaro. Post la Liberiĝo,

Paŝtejo sur la stepo Kabo





La paŝtistoj studas la verkon de Prezidanto Maŭ.

sub la eminenta gvidado de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la produkta fizionomio kaj la vivo de la vastaj paŝtistaj amasoj spertis profundan ŝanĝiĝon, post kiam la diversnaciecaj popoloj ĉi tie faris demokratian reformon kaj socialisman revolucion, kaj precipe depost popolkomunumigo. Dank' al la forto de la kolektiva ekonomio de popola komunumo, la vastaj amasoj de revoluciaj paŝtistoj racie utiligis kaj plibonigis la herbejojn, iom post iom starigis furaĝajn bazlokojn, veterinarajn kaj artgravedigajn staciojn, asignis diversajn paŝtejojn por malsamaj sezonoj kaj dividis brutaron en malpli grandajn gregojn por paŝtado. Generado de bonspecaj brutoj estas energie disvastigata, kaj estas uzataj novaj falĉmaŝinoj, kiuj povas falĉi ĉiutage pli ol 50 muojn da herboj, multe superante la rapidecon de homforta falĉado. La komunumo bredas pli ol 72,900 brutojn, tiu totala nombro multe superis tiun de malpli ol 20,000 kapoj antaŭ la fondiĝo de la komunumo, por ne kompari kun la tempo antaŭ la Liberiĝo.

La granda proletara kultura revolucio, persone iniciatita kaj gvidata de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, levis novan altan tajdon de la amasa movado de kreiva studo kaj kreiva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ kun senprecedenca vasteco kaj profundeco.

Sur la vasta stepo fore de la centra parto de la patrolando, la paŝtistoj loĝas kompare dise pro la bezonoj de paŝtado. Tamen, ni trovis dum nia vizitado, ke en ĉiu ĵurto pendas portreto de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ, en ĉiu produktgrupo troviĝas tabuloj kun liaj vortoj, kaj ĉie aŭdiĝas kantado de *Ruĝas la Oriento* en lingvoj de diversaj naciecoj. Ĉiuj posedas *Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong* kaj liajn aliajn verkojn. La paŝtistoj ĉiam portas kun si la ruĝan libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*, eĉ paŝtante unuope, por legi ĝin tuj trovante tempon disponeblan. Vespere en la somera paŝtejo, la paŝtistoj ofte interŝanĝas spertojn pri kreiva studo kaj kreiva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ ĉirkaŭ kampadfajroj. Kun senlime profunda proletara amo al nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ en la koro, ili diras: "Kun portreto de Prezidanto Maŭ en la ĵurto, fariĝis ebla al malriĉaj paŝtistoj sinoriento." "Kiam vortoj de Prezidanto Maŭ ĉe vojrandoj avertas, en paŝtado por la revolucio ni vojon ne perdas."

La brila penso de Maŭ Zedong lumigas la vastan stepon, tiel ke profunde ŝanĝiĝis la spirita fizionomio de la vastaj revoluciaj paŝtistaj amasoj. Antaŭ la granda proletara kultura revolucio, ĉitieaj kazaĥaj paŝtistoj intersalutis ofte per la demandoj: "Kiel vi fartas?" "Ĉu bone statas la brutoj?" Nun tiu de generacioj heredita kutimo estas anstataŭita per tute nova moro. Enirinte en ĉiun ajn feltan ĵurton, vi aŭdos de la paŝtistoj kiel la unuan frazon jenon: "Vivu Prezidanto Maŭ!" aŭ "Senlime longan vivon al Prezidanto Maŭ!"

La plej karakteriza trajto de la revoluciaj paŝtistoj kaj kamparanoj en ilia studo de verkoj de Prezidanto Maŭ estas tuja apliko de lernitaĵo. Multaj kortuŝaj aferoj okazis inter la paŝtistoj de la komunumo "Ruĝa Stelo" en iliaj heroaj bataloj kontraŭ la naturo por protekti la brutojn de la kolektivo.

Foje, neĝego malofta de dekoj da jaroj falis en Hinjuan dum pli ol dek tagoj. La 54-jara paŝtisto Muhamija, kiu ĝuste paŝtis sur la stepo, estis enfermita de la ventego en neĝvalon je kelkaj

metroj profundan kune kun la ĉevaloj. Sed la malfacilo ne povis senkuraĝigi tiun revolucion, maljunan paŝtiston, armitan per la penso de Maŭ Zedong. La maljunulo pensis en si: “La komunumo lasis min paŝti tiujn plibonigitajn ĉevalojn, tio estas granda konfido al mi. Mi absolute ne devas permesi ian damaĝon al la kolektiva havaĵo.” Por konduki la ĉevalojn el la neĝamaso al montdeklivo fronte al la suno, sur kiu la neĝo estis malpli multa, li uzis la tempon de tuta tag-nokto por fari en la neĝo koridoron longan je 50 metroj, kondukantan al la montdeklivo en la kontraŭa flanko. En tiu tempo, la manoj kaj piedoj de Muhamija jam tute ŝveliĝis de frosto, kaj sur lia barbo pezis glaciaj pendaĵoj. Sed ekmemorante la instruon de Prezidanto Maŭ en lia brila verko *Montotranslokigo Fare de Malsaĝa Avo* “**faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon**”, li komencis alportadi de la kontraŭa montdeklivo sovaĝajn herbojn por sterni ilin sur la koridoron spite al la ĝisoste malvarma vento. Fine li alkondukis la ĉevalojn unun post alia al la koridoro kaj sekure pelis ilin al la montdeklivo en la kontraŭa flanko.

Estas alia paŝtisto nomata Bajibolati, kiu partoprenis la nacifestan solenon de la jaro 1964 en Pekino kaj glorie vidis la grandan gvidanton

de la diversnaciecaj popoloj Prezidanto Maŭ. Tio estas por li plej glora kaj feliĉa. Kun senkompare profunda klasa amo al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, li studis energie kaj senlace verkojn de Prezidanto Maŭ. Ĉiujn vortojn kaj frazojn de Prezidanto Maŭ, kiujn li lernis, li gravuris en sian koron. Foje, unu el la delikatharaj ŝafoj de li paŝtataj vundiĝis. Por resanigi ĝin, li donis al ĝi plej grandan zorgon. En la nokto, timante ke la vundita ŝafo suferis de frosto, li kondukis ĝin en sian ĵurton. Kiam vento ekblovus meznokte, li kovris ĝin per sia litkovrilo preferante mem resti en malvarmo. Li tiel flegis ĝin, ĝis tiu tute resaniĝis kaj grasiĝis. Li diris: “La ĉina Ĥruŝĉov distrumpetis pri ‘materia stimulo’ por konduki la paŝtistojn al la misvojo de kapitalismo kaj detruai la kolektivan ekonomion. Sed ni ĝuste volas sekvi la instruon de Prezidanto Maŭ, paŝti por la revolucio, solidigi kaj disvolvi la kolektivan ekonomion per praktikaj agadoj, bati la ĉinan Ĥruŝĉov kaj subteni la revolucion de la monda popolo.”

Dum la pasintaj vintro kaj printempo, kvankam parto de paŝtaj brigadoj de tiu komunumo suferis katastrofon de neĝblovo, tamen la vastaj amasoj de paŝtistoj venkis la malfacilojn sub la helpo de la propagandaj taĉmentoj de la penso de Maŭ



Grasa subtillana ŝafo de Hingiang

Zedong senditaj de PLA kaj atingis ke sur la bazo de sinsekvaj bonrikoltoj en brutbreda produkto, la nombro kaj kvalito de la diversaj bredataj brutoj havis kompare pli grandan disvolviĝon kaj altiĝon. Depost la pasintaj vintro kaj printempo, la totala nombro de diversaj brutoj superis tiun de 1966, la jaro de plej granda riĉrikolto, je pli ol 2,000 kapoj, kaj vivipovaj brutidoj atingis pli ol 95 procentojn

UNUIĜO SUB LA RUĜA STANDARDO DE LA PENSO DE MAŬ ZEDONG

En la popola komunumo "Ruĝa Stelo", kune vivas membroj de diversaj naciecoj, inkluzive kazaĥojn, ujugurojn, hujojn, hanojn, tartarojn, uzbekojn, rusojn, siboojn kaj ĥalĥazojn. Sub la gvidado de la brila penso de nacia politiko de Prezidanto Maŭ, ili kunvivas intime kaj solidare konstruas kune la grandan socialisman patrolandon.

Antaŭe, iuj el la naciecoj de tiu loko ne havis kutimon terkulturi aŭ kulturis teron tre malmulte, tial la rikoltita greno ne sufiĉis por la konsumo de la loĝantaro kaj estis necese akiri grenon kontraŭ ŝafoj, ĉevaloj kaj bovoj. Sekve la procentoj de buĉitaj brutoj estis plialtigitaj kaj sekve havis tre malfavoran influon al la disvolvado de paŝtado.

Nun laŭ la direktivo de Prezidanto Maŭ, ke la agrikulturo, forstado kaj paŝtado devas interdependiĝi, la revoluciaj paŝtistoj kaj kamparanoj de la komunumo dividis sin en paŝtajn kaj agrikulturajn brigadojn. La diversnaciecaj komunumanoj laborantaj en tiuj brigadoj reciproke subtenas sin kaj lernas unuj de aliaj, kaj tio forte akcelis la interŝanĝon kaj disvolvon de la kulturo, ekonomio kaj aliaj inter la diversnaciecoj. En tiu regiono, kiu estis tre subevoluinta antaŭ la Liberiĝo, post la komunumigo, nove stariĝis ne nur vendejoj, hospitalo, lernejoj, banko, grenvendejo, grenprilaborejo kaj traktora stacio, dank' al la kolektiva forto, la popola komunumo eĉ aĉetis pli ol dek grandajn traktorojn, pli ol 30 falĉmaŝinojn, pli ol 80 sarkilojn kaj krome kombajnojn kaj ŝarĝaŭton, kiuj multe helpas la disvolvon de agrikulturo kaj paŝtado. Sole en la jaro 1967, la komunumo vendis al la ŝtato ĉirkaŭ 6,000 tunojn da greno kaj 175 tunojn da olea materialo, tenante ĉe si ankoraŭ sufiĉan kvanton por la propra konsumo de la komunumanoj kaj necesa rezervo.

Nur, kun la proksimiĝo de la kompleta venko de la granda proletara kultura revolucio, la socialisma konscio de la diversnacieca membraro de la komunumo multe pli leviĝas kaj aperas ankaŭ nova alta tajdo de revolucio kaj produkto.



Ĉevalgrego sur stepo

Hiŝuangbanna en

Vigla Prosperado

LA proletara kultura revolucio de nia lando alportis profundan ŝanĝon al Hiŝuangbanna en Junnan-provinco. Sub la helpo de propaganda taĉmento de la penso de Maŭ Zedong de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, la tieaj vastaj revoluciaj amasoj de taj-oj strikte sekvas la grandajn strategiajn dispoziciojn de Prezidanto Maŭ kaj ĝisfunde frakasis la intrigon de kapitalisma restaŭro de la ĉina Ĥruŝĉov kaj liaj agentoj en Hiŝuangbanna. Sub la brilo de la granda penso de Maŭ Zedong, la vasta revolucia taj-a popolo nun grandpaŝe marŝas laŭ la revolucia vojo montrita de Prezidanto Maŭ.

NEŜANCELIGĖ IRI LA SOCIALISMAN VOJON, STRIKTE SEKVANTE PREZIDANTON MAŬ

Mannaĝuang estas izolita kaj fora vilaĝo. En la tagoj de batalakiro de kompleta venko de la granda proletara kultura revolucio de nia lando, tie regas senprecedence gaja kaj vigla etoso. Sur la stratoj senĉese moviĝas homoj en festa kostumo; laŭte aŭdiĝas el la elementa lernejo sonado de tamburo kaj gongo; en la montvalo kaj super la densa arbaro ŝvebas revoluciaj kantoj prikantantaj la grandan gvidanton de niaj diversaj naciecoj Prezidanto Maŭ.

En la kurso de la penso de Maŭ Zedong, taj-aj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj en Mannaĝuang kreive studas kaj kreive aplikas verkojn de Prezidanto Maŭ, senkompate kritikis la kontraŭrevoluciajn reviziismajn absurdaĵojn de la ĉina Ĥruŝĉov, forte batas la plenmanon da klasaj malamikoj, altigis sian konscion pri defendo de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ, kaj pli firmigis sian decidon iri la kolektivigan vojon de socialismo.

Antaŭlonge la taj-aj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj en Mannaĝuang jam

suriris la vojon de kolektivigo. Kiam la ĉina Ĥruŝĉov levis la nigran venton de “tri pliigoj kaj unu fikso”*, liaj agentoj en Hiŝuangbanna haste rapidis al la vilaĝo kaj devigis la malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn al retroiro. Sed la lastaj ne konsentis. Tiam la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon imputis al ili multajn kulpojn kaj kalumniis, ke la vojo de kolektivigo “ne alportis al la taj-a popolo ion bonan”. Nun, ripetade studinte la eksplikojn de Prezidanto Maŭ pri la socialisma reformo de agrikulturo, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj vidas pli klare. Ili diris: “La vojo de socialismo estas direkto montrita de Prezidanto Maŭ, kaj tiun vojon ni iras definitive.”

Ekboldas Mannaĝuang. La tieaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj konfirmas, ke la vojo de socialismo montrita de Prezidanto Maŭ estas larĝa vojo kondukanta al feliĉo.

KRITIKA KUNVENO ĈE “MALĜOJIGA LAGETO”

Sub la helpo de PLA-anoj alvenintaj por subteni agrikulturon, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la vilaĝo Manlonggang levis amasan movadon de kreiva studo kaj kreiva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ kaj disvolvis profundan kaj daŭran revolucian amasan kritikon.

Manlonggang estas vilaĝo iom post iom formita en la malnova socio de tie kolektiĝintaj laboruloj, kiuj ne havis hejmon aŭ estis forpelitaj de *tusi* kaj *toŭĵen*** . Sed, trovinte tiun vilaĝon, *tusi* kaj *toŭĵen* tuj komencis pli intensan ekspluaton al tiuj laboruloj. Ili devigis tiujn mizerulojn, kiuj havis nek sufiĉan veston nek sufiĉan manĝon, fosi fiŝbredan lageton ĉe iu montpiedo por kontentigi iliajn bezonojn. La *tusi* kaj *toŭĵen*

ofte batis ĉe la lageto vilaĝanojn ĝis karnoŝiriĝo, kiuj ne sukcesis kapti grandajn fiŝojn. Aliaj mizeruloj, kiuj ne povis sin vivteni, venis ofte al la lageto por priplori sian malfeliĉon, tial oni nomis ĝin "malĝojiga lageto".

Por ke la amasoj de Manlonggang neniam forgesu la klasan amaron kaj ĉiam memoru la suferitan maljustecon plenan de sango kaj larmoj, la propaganda taĉmento de la penso de Maŭ Zedong de ĈPLA helpis la tieajn malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn aranĝi ĉe la fiŝlageto ekspozicion de komparo inter la nova kaj malnova socio kaj faris la ekspozicion areno de revolucia amasa kritiko.

Centre de la ekspozicio pendis portreto de Prezidanto Maŭ, la granda gvidanto de ĉiuj naciecoj kaj ĉirkaŭe estis algluitaj multaj el liaj eldiroj. En la ekspozicio estis montrataj multaj luksaĵoj kaj ekspluataj instrumentoj uzataj de *tusi* kaj *toŭŝen* en la malnova socio. La ekspozicio montris ankaŭ la ŝanĝiĝon de la familio de la malriĉkamparano Ging Kang inter la nova kaj malnova socio. En la malnova socio, pro la kruela ekspluato, la familianoj de Ging Kang sin vestis per arboŝeloj kaj sin nutris per sovaĝaj legomoj, kaj sur iliaj litkovriloj tuberoj formiĝis inter tuberoj. En la nova socio, dank' al la eminenta gvidado de Prezidanto Maŭ, la familio de Ging Kang kaj aliaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj liberiĝis politike kaj fariĝis la mastro de la nova socio, kaj ankaŭ ilia vivo multe pliboniĝis.

En la sama ekspozicio, montriĝis la du mondoj en okulfrapa kontrasto. Vidinte la fiŝlageton, la vizitantoj amare eklarmis. Bo Ju-ang, maljuna komunumano-malriĉkamparano, antaŭe estis asig-nita kiel fiŝisto de *tusi* kaj *toŭŝen*, sed li mem neniam gustumis fiŝon en la malnova socio. Lia patro fiŝkaptis siatempe en frosta vintro por *tusi*, sed ne sukcesis, pro tio li ricevis batvundojn sur la tuta korpo kaj cetere devis fari punlaboron. Ĉifoje, li dolore ekploris ĉe la lageto, draste kritikante la ĉinan Ĥruŝĉov. Li diris: "Lageto, ve, malĝojiga lageto! En la malnova socio *tusi* kaj *toŭŝen* frandis tra la tuta jaro viandon kaj fiŝon, dum ni fiŝistoj devis kapti fiŝojn en akvo dum frosta vintro; kvankam ni laboregis la tutan jaron, tamen eĉ fiŝoston ne vidis. La ĉina Ĥruŝĉov babilaĉis, ke 'ekspluato estas merito'. Vidu, kia merito ĝi estas! Li volas ke ni retroiru kaj refoje suferu la malnovan amaron. Mi riskos mian vivon por lukti kontraŭ tiu, kiu kuraĝus treni nin sur la vojon al la malnova socio."

Dank' al la helpo de PLA-anoj alvenintaj por subteni agrikulturon kaj kreiva studo kaj kreiva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ, Baj Venda, kadro de malriĉkamparana deveno, post intensa ideologia batalo en sia cerbo, fine reprenis sur sin la taskon teni la revolucion kaj stimuli la produkton kaj decidis bone teni kaj uzi la potencon por la proletaro kaj la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

En 1958, Baj Venda laboris kiel kontisto. Kiam la ĉina Ĥruŝĉov kaj liaj agentoj en Junnan-provinco freneze praktikis en 1960 la kontraŭrevolucion reviziisman linion por restaŭri kapitalismon en la limregiona kamparo, Baj Venda kuraĝe elpaŝis rezisti kontraŭ la reakcia intenco de la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj faris meriton en la solidigo kaj disvolvo de la socialisma kolektiva ekonomio. Pro tio la amasoj elektis lin kiel gvidan kadron. Sed en la komenco de la granda kultura revolucio, plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon praktikis la reakcian burĝaran linion de la ĉina Ĥruŝĉov kaj Baj Venda ricevis batojn. De tiam li ekhavis la penson ne plu labori kiel kadro.

La kadroj kaj komunumanoj aranĝis kurson de la penso de Maŭ Zedong sub la helpo de la PLA-anoj venintaj por subteni agrikulturon. Baj Venda studis serion da instrukcioj de Prezidanto Maŭ pri la granda proletara kultura revolucio, kaj altiĝis lia konscio pri la batalo inter klasoj kaj inter la du linioj. Prezidanto Maŭ instruas: "La granda proletara kultura revolucio estas esence granda politika revolucio de la proletaro kontraŭ la burĝaro kaj ĉiuj ekspluataj klasoj sub la kondiĉoj de socialismo, estas daŭrigo de la longdaŭra batalado inter la Komunista Partio de Ĉinio kaj la de ĝi gvidataj vastaj revoluciaj popolamasoj en unu flanko kaj la kuomintanga reakciularo en la alia flanko, estas daŭrigo de la klasa batalo inter la proletaro kaj la burĝaro." Studinte tiun instruon de Prezidanto Maŭ, li multe plifortigis sian ideon pri la batalo kontraŭ malamikoj. Li pensis, ke en la senluma malnova socio, sub la eminenta gvido de Prezidanto Maŭ, la martiroj de la revolucio pene kondukis ekstreme malfacilan batalon kontraŭ la kuomintangaj reakciuloj, ne timante sangverŝon kaj vivoferon, tiel ke ni mizeruloj suferintaj dum multaj generacioj fariĝis la mastro de la lando kaj ĝuas feliĉan vivon. Sed la ĉina Ĥruŝĉov provis restaŭri kapitalismon,

Abonu

«EI POPOLA ĈINIO»



«El Popola Ĉinio» estas esperanta monata gazeto kun sinteza enhavo, bildoj kaj koloraj paĝoj.

La gazeto propagandas en diversaj formoj la penson de Maŭ Zedong, raportas brilajn atingojn de nia popolo en la socialisma revolucio kaj la socialisma konstruado sub la eminenta gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ.

Tiuj, kiuj volas aboni la gazeton, bonvolu turni sin al la Libroservo de la Ĉina Esperanto-Ligo (P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio).

Esperantaj kursanoj kaj junaj lernantoj de ĉiuj landoj ĝuas favoran abonon.

Estas bonvene, ke legantoj, kiuj fervore disvastigas nian gazeton, estu niaj perantoj. Tiuj povas rekte kontaktiĝi kun la Libroservo de la Ĉina Esperanto-Ligo aŭ la redakcio de la gazeto.

kaj se ni malriĉkampanoj kaj malsuperaj mez-kampanoj ne tenus la potencon kaj lasus la reakciajn *tusi* kaj *toŭŝen* restarigi sin, ni estus refoje suferontaj la malnovan amaron. De tiam, li revigligis sian revolucionan spiriton, faris publike memkritikon antaŭ la amasoj, gvidas ilin disvolvi la revolucionan amasan kritikon kaj levi altan tajdon

de tenado de la revolucio kaj stimulado de la produkto.

* Vidu «Enciklopedieton» en EPC, 1968, n-ro 2.

**Tusi kaj toŭŝen estis feŭdaj lokaj regantoj en regionoj de nacimalplimulto de Ĉinio antaŭ la demokratia reformo, kiuj ekspluatis kaj subpremis la laborantan popolon.

Abunda Rikolto de Rizo sur Salalkala Tero

SUB la lumo de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, la vastaj amasoj de revoluciaj kadroj, malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj de la gubernio Lankaŭ firme tenas la revolucion kaj forte stimulas la produkton. Kun sentima heroa spirito, ili konkeris la salalkalan teron, alkondukis la akvon de la Flava Rivero por kulturi tie rizon, kaj akiris riĉan rikolton de rizo sur grandaj areoj en nemalmultaj lokoj. La Sanjiĝaj-a Popola Komunumo estas unu el la elstaraj ekzemploj tiurilate.

I

La Sanjiĝaj-a Popola Komunumo, kiu situas sur la bordo de la Flava Rivero, neniam antaŭe kulturis rizon. Tamen, en 1968, ĝi kulturis tie pli ol 11,000 muojn da rizo. La plejparto el tiuj rizkampoj produktis pli ol 400 aŭ 500 ĝinojn po muo, kaj la plej alta produktkvanto atingis pli ol 1,000 ĝinojn. La totala produktkvanto de la aŭtunaj grenoj de la tuta komunumo atingis senprecedence altan nivelon. Tiu multe katastrofa regiono, kiu de tiom da jaroj konsumis la grenon provizatan de la ŝtato kaj dependis de ŝtata monhelpo, komplete ŝanĝis sian situacion, en unu sezono de 1968, tiel ke lastaŭtune estis venditaj al la ŝtato 1,000,000 ĝinoj da superflua greno.

Antaŭ la stato de riĉa rikolto, ĉiuj komunumanoj estis plenaj de ĝojo kaj eksciteco. Multaj ne povis sin deteni de dancado kaj kantado, vidinte la vastan etendaĵon de ore flavaj rizplantoj. Ĉaj Venhaj, 81-jara malriĉkampano de la sepa produkta grupo de kangĝaj-brigado, jam kuŝis malsane de pli ol unu jaro. Kiam li informiĝis pri la riĉa rizrikolto, li ĝoje leviĝis de sia lito kaj venis al la rizkampoj kun helpo de bastono. Per ambaŭ manoj li karesis rizospikojn kaj diris kortuŝite kun larmoj: "Dum mia tuta vivo, mi laboris kiel jardungito, manĝis herbosemojn kaj trinkis maldolĉan akvon. Nun, sub la gvido de Prezidanto Maŭ, ni kreskigis rizon sur la sal-

alkala tero. Bone, bone! Ni ŝuldas dankon al Prezidanto Maŭ pro ĉio ĉi tio."

Vidante tiun prosperan aspekton de la riĉrikolta kamparo, kiu povas imagi, ke ĝi estis antaŭe nur blanka salalkala tero! En la pasinteco, la Sanjiĝaj-a Popola Komunumo estis unu el la plej malriĉaj lokoj de Lankaŭ. Antaŭ la Liberiĝo cirkulis ĉi tie la jena popolokanto:

*Printempe blankas saltero prujne,
Somere akvo ŝveliĝas ĉien,
Komplete mankas rikolt' aŭtune,
En vintro migru for ali-ien.*

Post la Liberiĝo granda ŝanĝo okazis en Sanjiĝaj. Sed naturaj katastrofoj ankoraŭ ne estis tute elradikitaj, kaj oni devis konsumi la grenon provizatan de la ŝtato ĉiujare. Depost la komenco de la granda proletara kultura revolucio, la vastaj amasoj de malriĉkampanoj, malsuperaj mezkampanoj kaj revoluciaj kadroj de Sanjiĝaj-a Popola Komunumo uzis en produktado sian altan laborenergion vekitan de la kultura revolucio. Ili batalis kontraŭ la naturo, fosis la riveron, konstruis kanalojn, kaj kondukis la fekundigan akvon de la Flava Rivero en la kamparon, por precipiti tie la leŭson portatan en la riverakvo, ĝis la salalkala tero kovriĝis per tavolo da leŭso dika je pli ol unu futo, tiel ke la sterila tero estis transformita en fekundan kamparon.

II

En batalado por akiri riĉan rizrikolton sur vastaj areoj, Sanjiĝaj-a Popola Komunumo trapasis seriozan klasbatalon.

En 1966, kiam la vastaj amasoj de ĝiaj membroj komencis alkonduki la akvon de la Flava Rivero por prove kulturi rizon, la agentoj de la ĉina Ĥruŝĉov en Lankaŭ-gubernio asertis ke "irigacio per la akvo de la Flava Rivero faros la teron ankoraŭ pli alkala", kaj tio estas "fantazio kaj blinda fervoro". Per ĉiuj rimedoj ili sufokis la aktivecon de la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mez-

kampanoj en la transformado de la naturo kaj provis konduki la amason al malĝusta vojo por atingi sian kriman celon de restaŭro de kapitalismo.

Harditaj kaj provitaj en la granda proletara kultura revolucio, la vastaj amasoj de malriĉkampanoj, malsuperaj mezkampanoj kaj revoluciaj kadroj de la Sanjiĝaj-a Popola Komunumo energie studis la brilajn instrukciojn de Prezidanto Maŭ pri agrikultura produktado kaj, prenante la penson de Maŭ Zedong kiel armilon, disvolvis grandan amasan revolucionan kritikon. Plenaj de klasa malamo, multaj maljunaj malriĉkampanoj, kiuj profunde suferis en la malnova socio, per faktoj pri almozpeto, forvendo de gefiloj, senhejmiĝo kaj mizera vivo antaŭ la Liberiĝo, akre refutis ĉiujn absurdajn asertojn de la ĉina Ĥruŝĉov kaj kondamnis lian ĝisĉielan krimon de restaŭro de kapitalismo. Ju pli ili kritikis, des pli ili malamamis la ĉinan Ĥruŝĉov kaj amis Prezidanton Maŭ; ju pli ili kritikis, des pli firmiĝis ilia decido iri la socialisman vojon. Ili diris: "Prezidanto Maŭ donas al ni subtenon, ni do devas gajni gloron por Prezidanto Maŭ kaj nepre atingi ion rimarkindan."

La transformo de la tero en rizkampojn estis ankaŭ batalo kontraŭ la inertaj fortoj de malnova kutimo. Tuj kiam komenciĝis la konstrua laboro, venis ankaŭ malaprobaj opinioj de diversaj flankoj. Iu diris: "Vi volas kulturi rizon sur la salalkala tero?! Vi eĉ ne ricevos pajlon por ne paroli pri greno!" Des pli dubemaj estis iuj maljunuloj. Kontraŭ tiu stato, la revolucia komitato de la komunumo organizis la vastajn amasojn de revoluciaj kadroj kaj malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj en ripetadan studadon de la "tri popularaj artikoloj" de Prezidanto Maŭ kaj lia instruo ke "**malriĉeco igas aspiri al ŝanĝo, entreprenado kaj revolucio**", kaj en lernadon de la decidemo de la bona kadro de Prezidanto Maŭ k-do Giaŭ Julu pri ŝanĝo de la fizionomio de Lankaŭ, profunde disvolvis la bataladon kontraŭ egoismo kaj kritikadon al reviziismo kaj solvis la diversajn problemojn en pensado kaj konado kaj serion da praktikaj demandoj en la alkondukado de riverakvo por irigacio. Per la amasa movado de kreiva studo kaj kreiva apliko de la penso de Maŭ Zedong, senprecedence leviĝis la klasa konscio de la vastaj amasoj de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj kaj ilia konscio pri la batalo inter la du linioj. Granda ŝanĝo okazis en ilia ideologia fizionomio. Ili diris: "Prezidanto Maŭ jam montris al ni la vojon de lumo kaj feliĉo. Kiam ni komencu agi, se ne nun?"



Knabinoj de la Sanjiĝaj-a Popola Komunumo legas la Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong ĉe amaso de rizo.

Kiam ilia penso estis ĝuste orientita kaj decido farita, leviĝis ankaŭ la laborfervoro. Ili formis komandejon el reprezentantoj de la revoluciaj kadroj de la komunumo, de la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj kaj de la teknikistoj por direkti la konstruadon de irigaciaj kanaloj. La tuta komandejo laboris, manĝis kaj tranoktis sur la konstruejo, kaj ĉiuj ĵuris, ke ili reiros hejmen, nur kune kun la rikoltita rizo.

La praktiko plej efike edukas. La fakto de la abunda rizrikolto konvinkis ankaŭ la kadrojn kaj komunumanojn, kiuj antaŭe ne kredis la transformeblecon de la salalkala tero kaj estis pretaj forlasi la terkulturadon por okupi sin pri komerco. Kelkaj kadroj de produktaj grupoj, kiuj ne tiom energie laboris en la pasinteco, nun aktive gvidas la komunumanojn en irigaciaj konstrulaboroj por alkonduki la akvon de la Flava Rivero. Iu maljunulo antaŭe ne kredis, ke oni povos ricevi riĉan rizrikolton. Ĉifoje, kiam li vidis, ke oni efektive tion atingis, li venigis la maljunulojn de sia produkta grupo al la kampoj kaj diris: "Niaj cerboj fariĝis jam tro konservativaj, kaj ni ne devas rigardi novajn aferojn per niaj malnovaj okuloj! Lastajare ni akiris la riĉan rizrikolton pro tio, ke ni sekvis la vortojn de Prezidanto Maŭ kaj ŝuldis dankon al li." Ĉiuj maljunuloj diris ridante: "Prave! Prave! Ne al la ĉielo, nek al la tero, ni dankas la riĉan rikolton, sed nur al Prezidanto Maŭ!"

Sukcesa Provprodukto de la Hianfeng-instalaĵo por la Elektra Fornego "Ruĝas la Oriento"

LABORISTOJ kaj revoluciaj teknikistoj de la Fabriko de Mekanikaj kaj Elektraĵaj Ekipaĵoj de la Benhia Ferŝtala Kompanio de nia lando sukcese kreis la unuan *Hianfeng*-instalaĵon por la elektra fornego "Ruĝas la Oriento". La uzado de tiu ekipaĵo en ŝtalfabrikado multe altigas la sentivon kaj lev-nivelon, simpligas la procedon kaj mallongigas la fandtempon, kompare kun apliko de aliaj antaŭirantaj instalaĵoj uzataj en nia lando.

La sukcesa kreo de la *Hianfeng*-instalaĵo por la elektra fornego "Ruĝas la Oriento" elokvente montras, ke la laboristaro estas la ĉefa forto en scienca kaj teknika revolucio. Nur 94 tagojn oni uzis por ĝin krei, de provo, produkto ĝis finmunto. Al kio ŝuldis, ke la ordinara laboristoj povis tiel rapide krei tiel alte aŭtomatan instalaĵon? La laboristoj diris: "Dank' al la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong!"

Antaŭ la provfarado de la nomita ekipaĵo, fondiĝis sub la gvido de la revolucia komitato de la fabriko eksperimenta grupo konsistanta el laboristoj, revoluciaj teknikistoj kaj revoluciaj kadroj. Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ "sen detruo ne estas konstruo", ili vidis, ke la laboristaro povas firme teni en siaj manoj la potencon super scienco kaj tekniko, nur se estas profunde disvolvita revolucia amasa kritiko kaj eliminata la venena influo de la reviziisma linio de "administrado de la fabriko per specialistoj", kiun praktikigis la ĉina Ĥruŝĉov. Ili disvolvis revolucion amasan kritikon ĉe la eksperimentejoj. Iu laboristo diris indigne: "La ĉina Ĥruŝĉov kaj liaj agentoj en la fabriko oponis kontraŭ elstarigo de la proletara politiko, praktikis 'instigon per materio,' 'administradon de la fabriko per specialistoj' kaj 'teknikon en komando', subfosis la produkton kaj tenis nin konsciajn laboristojn kun praktika

III

Kadroj kaj komunumano de la Sanjiĝaj-a Popola Komunumo ĝoje esploras la abundan rizrikolton.



Dank' al la granda proletara kultura revolucio, la popolo de Sanjiĝaj-a Popola Komunumo havas pli grandan idealon kaj pli vastan revolucion koron. La malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj diris: "Akirinte riĉan rikolton, ni ne devas forgesi Prezidanton Maŭ. Se ne estus la saĝa gvido de Prezidanto Maŭ, kiel ni povus alkonduki la akvon de la Flava Rivero sur la salalkalan teron? Kiel ni povus ricevi la hodiaŭan riĉan rikolton?" Kiam la komunumanoj malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj de la kvina produkta grupo de Nanmaĝuang-brigado rikoltis la rizon, ili elektis spikojn post spikoj la plej bone kreskantajn kaj plej dikajn grajnoj, senŝeligis kaj pakis ilin en lignan keston, sur kiun ili skribis "Vivu Prezidanto Maŭ", por sendi ilin al estimata kaj amata Prezidanto Maŭ. Tio reprezentas ne nur la fidelecon de la malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj de Nanmaĝuang, sed ankaŭ tiun de la 380,000 popoloj de Lankaŭ-gubernio al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ.

sperto ekster la pordo de scienca esplorado. Hodiaŭ, ni nepre kritikos ilin ĝis senkrediteco kaj okupos tiun ĉi batalpozicion!”

La revolucia amasa kritiko levis la konscion de la laboristoj pri la batalo inter la du linioj kaj akcelis la venkan disvolviĝon de la eksperimentado. Komenciĝis la eksperimentado por krei la *Hianfeng*-instalaĵojn por la elektra fornego “Ruĝas la Oriento”. La unua problemo renkontita estis manko de bluplano por tiu nova tekniko. En la pasinteco, oni bezonis indikojn pri mezuroj eĉ por detranĉi angulon de ŝtalpeco kaj bluplanon eĉ por torni ŝraŭbon. Kiel do oni faru nun sen bluplano? Iu veterana laboristo diris brave: “Mi ne kredas, ke ni fariĝos nemovkapablaj post forĵeto de la fremdaj rutinoj! Ni decideme rompu la superstiĉojn, liberigu la penson kaj mem faru ĉion per niaj propraj manoj!” Surbaze de sia riĉa praktika sperto, ili faris argilan modelon kaj akiris nemalmultajn unuamanajn konstataĵojn kaj kreis “bluplanon”, kian la burĝaraj aŭtoritatoj ne povis desegni. Tio ĝislarne kortuŝis la inĝenierajn kaj teknikajn laborantojn, kiuj partoprenis la provadon.

La dua malfacila problemo estis la projektado. En la pasinteco la laboristoj ne havis parolon en projektado kaj ekzistis netranspasebla abismo

inter la laboroj de la pretigo de projekto kaj de ĝia efektivigo. Nun la kamaradoj de la eksperimenta grupo lernis la instruon de Prezidanto Maŭ “**persisti pri la komando de la politiko, plifortigi la gvidon de la Partio, plene disvolvi amasan movadon, efektivigi la du partoprenojn, unu reformon kaj triflankan kombiniĝon* kaj energie konduki teknican revolucion**”, la laboristoj, revoluciaj teknikistoj kaj kadroj en ĝi kune sidis ĉe la fornego kaj interkonsiliĝis en plena demokratio, samtempe projektante, diskutante kaj difinante la planon. Dum la eksperimentado, ili ofte renovigis la antaŭan projekton laŭ la nove trovitaj plibonigeblecoj kaj faris ĝin iom post iom plej racia dum la praktikado. Tiamaniere, la netranspasebla abismo inter projektado kaj fabrikado foriĝis kaj la revolucia spirito de la laboristoj povis plene ludi sian aktivan rolon.

Post dekelkfoja provado, la eksperimenta grupo kun laboristoj kiel la ĉefa forto finfine sukcesis instali la *Hianfeng*-instalaĵojn por la elektra fornego “Ruĝas la Oriento”.

**Temas pri la partopreno de laboristoj en planado kaj administrado, la partopreno de administraj funkciuloj en produkto; reformo de ĉiuj arĥaikaj reguloj kaj sistemoj; kaj kombiniĝo de la gvidantaj kadroj, laboristoj kaj teknikistoj.*

La Sovetunia Reviziisma Kliko Praktikas Faŝisman Diktaturon super la Laboristoj

Sub la regado de la sovetunia reviziisma renegata kliko, la laborista klaso de Sovetunio denove troviĝas en malluma, mizera situacio kiel antaŭ la Oktobra Revolucio. Pro kio estas tio? Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ diris: “Ĉiuj revoluciaj bataloj en la mondo celas kapti kaj firmigi la regpotencon.” La kaŭzo de tio ke la sovetunia laborista klaso trafis refojan suferon, troviĝas en tio, ke la regpotenco, kiun ili akiris per heroaj bataloj sub la gvido de Lenin kaj Stalin, estas uzurpita de bando da renegatoj-reviziistoj. Kun regpotenco la proletaro kaj la laboranta popolo havas ĉion, sen ĝi — nenion. La tragedia kaj dolora leciono de la restaŭro de kapitalismo en Sovetunio instruas al ni, ke post alkapto de regpotenco la laborista klaso devas neniam forgesi klasbatalon kaj devas firme teni kaj fortikigi sian regpotencon sen ajna malstreĉiĝo eĉ je momento. La laborista klaso nepre devas okupi ĉiujn poziciojn kaj gvidi ĉion.

— La Red.

La sovetunia reviziisma renegata kliko perfidis la proletaran revolucion kaj senigis la laboristan klason, la mastron de la soveta ŝtato en la pasinteco, je ĉiuj rajtoj. Sekve de tio la

laborista klaso kaj la laboranta popolo de Sovetunio denove falis en abismon de malfeliĉoj kaj suferas la kruelan subpremadon, ekspluatadon kaj jugadon de la privilegia tavolo de la burĝaro.

Post la uzurpo de la ŝtata kaj partia potenco, la sovetunia reviziisma renegata kliko tutforte fortigas la ŝtatajn maŝinojn de ili superregatajn, kiaj armeo, polico, malliberejoj, juĝejoj ktp., kaj praktikas faŝisman diktaturon super la laborista klaso kaj alia laboranta popolo de Sovetunio, energie efektivigante blankan teroron. Kiu persistas en marksism-leninismo kaj kuraĝas lukti aŭ kontraŭstari, tiu estas gvatata, postsekvata, alvokata al pridemandado, eĉ arestata kaj malliberigata, aŭ estas ĵetata en koncentrejon sub akuzo pri ia senbaza krimo aŭ subite "malaperas" mistere. La sovetunia reviziisma renegata kliko praktikas barbaran subpreman politikon kontraŭ la revoluciaj bataloj de la laborista klaso. En junio 1967, la aŭtlaboristoj de Ĉimkent de meza Azio, Sovetunio, okazigis manifestacion proteste kontraŭ la senmotiva pafmortigo de iu ŝoforo fare de la sovetunia reviziisma polico, kaj atakis la urban ĝeneralan oficejon de la civila polico kaj la apudan policstacion. La sovetunia reviziisma aŭtoritato tuj elmontris plene sian diablan vizaĝon kaj ekspedis tankojn kaj kirasaŭtojn por fari sangan subpremon al la manifestaciantaj laboristoj. Dekoj estis mortigitaj surloke, kaj multaj aliaj estis vunditaj aŭ arestitaj. Ankaŭ en Ĥarkov, la ĉefoj de la sovetunia reviziismo perforte subpremis strikon de laboristoj. Iu lignolaboristo en Gruzio estis ekzilita al malproksima landlima regiono pro sia malkontento pri la freneza atako kontraŭ Stalin farita de la sovetunia reviziisma renegata kliko. La persekutado kaj subpremado fare de la sovetunia reviziisma renegata kliko al la sovetunia laborista klaso estas neniom malpli forta, eĉ pli feroca ol tiu farata de la regantoj en imperiismaj landoj.


La "nova sistemo de ekonomio", kiun la sovetunia reviziisma renegata kliko nun intense efektivigas en ĉiuj branĉoj de la nacia ekonomio, estas granda, plenampleksa retroiro al kapitalismo. Ili anstataŭigis la planan ekonomion kaj la principon de distribuo laŭ laboro de socialismo per la profita principo kaj libera konkurenco de kapitalismo, kaj ŝanĝis la entreprenojn de tutpopola posedsistemo en tiujn de posedsistemo de privilegia tavolo de burĝaro. Ĉio ĉi tio de ili efektivigata donis al la plenmano da burĝaraj privilegiaj elementoj pli multajn kaj pli grandajn privilegiojn kaj aliflanke plene reduktis la laboristojn al dungitoj-sklavoj. La ĉefo de iu lignosega entrepreno en Beslan sub la agrikultura departemento de Nord-Osetinska ASSR, apogante sin sur la disponata potenco, arbitre deklaris diversajn punojn al labor-

istoj kaj reduktis iliajn salajrojn por 1-2 monatoj. Ĉio povas servi al li kiel kaŭzo por puni laboristojn. Respondeculo de alia entrepreno, per si mem, en sola jaro starigis 223 puno-regulojn kontraŭ laboristoj kaj punis 125 laboristojn.

La sovetunia reviziisma renegata kliko intence kreis gigantan armeon da senlaboruloj kiel rezervajn trupojn por la industrio por plie pezigi sian ekspluatadon al laboristoj. Same kiel la entreprenoj en kapitalismaj landoj, por ĉasi profitojn, la entreprenoj de Sovetunio ofte grandamase maldungas laboristojn sub la pretekstoj "redukti superfluajn personojn" kaj "malŝveligi la personaron". Iu meĥanika inĝeniera administracio havas sume 350 laborantojn, kaj 318 homoj estis maldungitaj unuj post aliaj dum la oficperiodo de iu estro de tiu administracio.

Fortega rezisto kaj indigno montriĝas ĉe la laborista klaso de Sovetunio kontraŭ la absurdaj faroj de la sovetunia reviziisma renegata kliko. Tio ege maltrankviligis kaj timigis la perfidulan klikon de Breĵnev kaj Kosigin. Tial, por pliapaŝe subpremi laboristojn, ili faris, en decembro 1966, la tiel nomatan "rezolucion pri plifortigo de la disciplino de laboro" kaj deklaris, ke ili plene utiligos la "administrajn rimedojn leĝe difinitajn" en plifortigo de la "rolo" de la "prokurorejoj kaj la plej supera juĝejo de Sovetunio". Laboristoj, kiuj malkontentas pri la nuna stato de Sovetunio, estas frapataj kaj venĝpunataj de la sovetunia reviziisma renegata kliko per monpuno, administra puno, malpromocio aŭ redukto de salajro en kazo negrava kaj per eksigo aŭ eĉ malliberigo en kazo grava.

Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ montris: **"Sovetunio estas la unua socialisma ŝtato, kaj la Komunista Partio de Sovetunio estas partio kreita de Lenin. Kvankam la gvidanteco de la Partio kaj ŝtato de Sovetunio estas uzurpita de reviziistoj, tamen, mi konsilas niajn kamaradojn firme kredi, ke la vastaj amasoj de popolo kaj partiaj membroj kaj kadroj de Sovetunio estas bonaj kaj deziras revolucion, kaj ke la regado de reviziismo ne longe daŭros."** La sovetuniaj reviziismaj renegatoj, kiuj kruele subpremas kaj ekspluatas la laboristan klason, ne povos eskapi de la puno de la historio. Kun sia glora revolucia tradicio, la laborista klaso kaj laboranta popolo de Sovetunio nun senĉese plifortigas siajn revoluciajn batalojn, kaj finfine ili certe renversos la regadon de la sovetunia reviziisma renegata kliko kaj restarigos la diktaturon de la proletaro.



Letero de Albana Amiko G. C.

Kun nepriskribebla ĝojo mi ricevis vian karan leteron kune kun du kopioj de "VORTOJ DE PREZIDANTO MAŬ ZEDONG" kaj serio da belegaj bildkartoj. Sinceran dankon pro ĉio!

Tiutempe mi ripozis ĉe hejmo en nia vilaĝo kaj bonŝance ricevis trezorajn libretojn, kiuj lasis grandan impreson al miaj samvilaĝanoj.

Kia bona tio estas ke mi disponas la esperantan libreton "VORTOJ DE PREZIDANTO MAŬ ZEDONG", krom tiu en la albana lingvo. Nun oni tre bone konas penson de Prezidanto Maŭ en nia lando pere de vasta tradukado de liaj verkoj en la albanan lingvon.



Trapasinte diversajn malfacilojn kaj danĝerajn obstaklojn, Prezidanto Maŭ persone kondukis la trupojn, kiu partoprenis la Aŭtunrikoltan Ribelon, al Gingga-montaro kaj starigis ruĝan reĝimon en la meza parto de la montĉeno de Luohiaŭ.

Tiutempe, nia juna Laborista-Kampana Ruĝa Armeo ankoraŭ ne sciis fari amasan laboron. Batalpreninte Ĉaling, la dua roto de la Ruĝa Armeo ankoraŭ sekvis la malnovan manieron de direktado de trupoj kaj konis nenian politikan aktivadon krom la ĉiutagaj ekzercoj, leciondonado, gardstarado kaj patrolado. Poste, kiam la dua roto retiriĝis al Gingga-montaro kaj restis garnizone en Longŝi, Ning-

klaraj, koncizaj, kompreneblaj pensoj kaj instruoj de Prezidanto Maŭ facile kaj rapidece jam penetras en la kapojn kaj korojn de milionoj da homoj tra la tuta mondo, ĉar tiuj vortoj estas nenio alia ol marksismo disvolvita, pliriĉigita surbaze de nuntempa sperto de vivo kaj batalo de monda proletaro.

La glora historio de la granda frateca ĉina popolo kaj Ĉina Kompartio speguliĝas bone en la pensoj de Prezidanto Maŭ. Viaj faroj lumigas nian vojon.

Mi baldaŭ havigos al mi ĉiujn volumojn de elektitaj verkoj de Prezidanto Maŭ en la albana lingvo.

En majo oni publikigis la unuan volumon de "Elektitaj Verkoj de Kamarado Enver Hoxha". Tio estis ĝojiga novaĵo por mi.

Mi, samkiel ĉiuj albanaj instruistoj, studas ĉiutage dokumentojn de nia Partio kaj klasikajn verkojn de marksism-leninismo. Kompreneble, mi preferus legi verkojn de Prezidanto Maŭ ankaŭ en Esperanto. Dum iu vizito al amiko en ĉefurbo, kiu ankaŭ ricevis EPĈ, mi vidis sur lia skribotablo multnombrajn broŝurojn kaj libretojn en Esperanto kun politika enhavo, publikigitajn en Ĉinio. Ĉu vi povus sendi al mi tiajn presaĵojn?

Mi finos ĉi tiun leteron kun profunda amikeco kaj dankemo al vi. Pliajn sukcesojn en via laboro!

Prezidanto Maŭ Instruis Nin Mobilizi la Amasojn

gang, Prezidanto Maŭ persone iris al la roto kaj faris paroladon al ĝi. Komence Prezidanto Maŭ diris, ke la roto kuraĝe kaj tre bone batalis en Ĉaling. Lia laŭdo treege ĝojigis la batalantojn. Sed li daŭrigis, ke estis ne bone, ke la roto faris nek amasan laboron, nek financajn klopodojn. Poste li detale klarigis la taskojn de laborista-kampana revolucia armeo, dirante ke ne sufiĉas al nia laborista-kampana revolucia armeo nur kondukti bone al la amasoj, ĝi devas mobilizi ilin al kuna farado de revolucio. Ĉiuj en la armeo estas batalantoj kaj ankaŭ propagandantoj. Ni devas ne nur batali, sed ankaŭ propagandi niajn vidpunktojn al la amasoj, organizi kaj armi ilin. Nur se ni firme unuiĝos

kun la amasoj, la venko de la revolucio estos certigita. Tiam li etendis siajn manojn, kaj fleksis unun post alia la fingrojn de sia maldekstra mano per la dekstra por laŭvice proklami la tri grandajn taskojn de la laborista-kampana revolucia armeo: unue, batali por ekstermi la malamikojn; due, faligi lokajn tiranojn kaj akiri financajn rimedojn; trie, propagandi al la amasoj, organizi ilin kaj starigi revoluciajn komitatojn. La vortoj de Prezidanto Maŭ kvazaŭ brila lampo en nokto hele lumigis la koron de la batalantoj.

Iun tagon poste, Prezidanto Maŭ kunvokis la trupojn kaj diris al ili: Nun ni kune iros al Sujĉuan por tie faligi lokajn tiranojn, akiri financajn

Ruĝa Signal-lanterno

Kolektive adaptita de la Ĉina Pekinopera Trupo



PERSONOJ

Li Juhe, fervoja komutisto kaj subtera membro de la Komunista Partio de Ĉinio

Tiemej, lia adoptita filino

Avino, edzino de lia majstro kaj subtera membrino de KPC

La kuriero, kuriero de KPC-organizaĵo de la norda Manĉurio

La tranĉil-akrigisto Ĝaŭ, membro de la gerila taĉmento de Norda Monto

Majstro Ĝoŭ, subtera membro de KPC

Gujlan, najbarino de Tiemej

Onklino Liu, bopatrino de Gujlan

Taĉmentestro Liu, estro de la gerila taĉmento de Norda Monto

Gerilanoj

La kaĉo-vendistino

La kolportistino

Popolanoj A, B, C, Ĉ

rimedojn kaj mobilizi la amasojn. Sub la kondukado de Prezidanto Maŭ, la trupoj malsupreniris de la montaro al Sujĉuan. La armeanoj malfermis la firme ŝlositajn pordegojn de la lokaj tiranoj kaj vidis, ke tiuj jam bone preparis ĉion por la Printempa Festo. Kiam la armeanoj iris al la malriĉuloj, ili trovis nenion alian en iliaj malhelaj, humidaj kaj kadukaj domoj, ol eluzitan maton sur la lito. Kun indigno, la kamaradoj komplete renversis ĉiujn endomajn objektojn de la lokaj tiranoj kaj dividis inter la malriĉuloj ĉiujn havaĵojn de la bienuloj.

Tamen, la pliparto de malriĉuloj ne kuraĝis akcepti tiujn objektojn. La ruĝaj armeanoj do faris laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ unue disdoni al ili manĝeblaĵojn. Tio unuflanke respondis al la vivbezonoj de la amaso, kaj aliflanke malebligis al la lokaj tiranoj repreni la disdonitajn objektojn. Tiamaniere, rapide disvastiĝis la famo pri la amo

de la Laborista-Kampana Ruĝa Armeo al la amasoj. La Ruĝa Armeo organizis la kadrojn de plotonoj kaj subplotonoj en multajn grupojn por fari propagandon diversloke al la publiko. Ĉiu grupo kunportis malgrandan flagon el ruĝa ŝtofo kun la surskribo: Propaganda Taĉmento. Kie flirtis la ruĝa flago, tien alsvarmis la amasoj por atente aŭskulti ĉirkaŭe la paroladon de ruĝaj armeanoj. Kiam la ruĝaj armeanoj vidis antaŭ si la grandan amason da malriĉuloj, la suferoj, kiujn ili spertis hejme, tuj svarmis en ilia koro: "Same kiel vi, ankaŭ ni hejme suferis plene la subpremadojn kaj ekspluatadojn de lokaj tiranoj kaj malbonaj sinjoroj. Ni ne povis akiri sufiĉan manĝon, malgraŭ ke ni plenforte laboregis en ŝvito. Se ni malriĉuloj volas ŝanĝi nian pozicion, ni devas faligi la lokajn tiranojn kaj malbonajn sinjorojn, distribui ilian teron kaj organizi revoluciajn komitatojn por batali kontraŭ ili!" Post tiuj vortoj, ĉirkaŭstarantoj kriis sloganojn, kaj

poste la ruĝaj armeanoj kondukis la amason al la domoj de lokaj tiranoj por dividi iliajn vestaĵojn, grenon, meblojn kaj aliajn objektojn, kaj ankaŭ iliaj porkoj estis buĉitaj kaj disdonitaj al malriĉuloj.

Antaŭ ol pasis kelkaj tagoj, revolucia situacio plene elvolviĝis en la gubernia urbo. Prezidanto Maŭ plie sendis trupojn al la antaŭurbo por disvolvi tie la laboron, kaj arda revolucia batalo leviĝis tra la tuta gubernio Sujĉuan. La mizeraj amasoj leviĝis, la lokaj tiranoj kaj malbonaj sinjoroj estis faligitaj, la reacia reĝimo disfalis, kaj laborista-kampana revolucia reĝimo stariĝis. Ruĝaj gvardioj kaj partizanaĵoj taĉmentoj gardis la venkajn fruktojn de la revolucio. Sub la persona gvidado de Prezidanto Maŭ, tiu ĉi nemulte nombranta laborista-kampana revolucia forto disvolvis geriladon ĉirkaŭ Gینگang-montaro, fondis kaj disvastigis revoluciajn bazlokojn kaj bruligis ĉie la revolucian militfajron.

Hatojama, ĉefo de la japana ĝendarma trupo kaj
“bonkonanto pri Ĉinio”

Vang Lian-gju, antaŭe nia subtera laboranto, kiu
estas publike patrolestro de la pupa polico,
kaj poste perfidulo

Hoŭ Hianpu, ĉina asistanto de Hatojama

La japana kaporalo, kaporalo de la japana ĝen-
darma trupo

Spiono A, ŝajnigita gerilano por trompakiri la
ĉifrolibron

La ŝuisto, spiono de la japana ĝendarma trupo

Spionoj, pupaj policistoj

Japanaj ĝendarmoj

SCENO I

SAVO AL LA KURIERO

Malfrua aŭtuna nokto en la tempo de la Kontraŭ-
japana Rezistmilito.

Komutejo proksima al la fervoja stacio de Longtan
en nordorienta Ĉinio. Proksime estas longa deklivo
kaj malproksime montoj.

Kiam la kurteno leviĝas, estas mallume kaj la norda
vento ululas. Kvar japanaj ĝendarmoj trapasas la
scenejon patrole.

Aplombe kaj trankvile envenas Li Juhe kun signal-
lanterno en la mano.

Li: *Mi ĉirkaŭrigardas kun signal-lantern' en man';
Venos la sendito de l' Partio el la nord'.
Tridek post la deka estas la fiksita hor',
Lin alportos certe l' sekva trajno al Longtan.
(Rigardas al sia poŝhorloĝo.)*

Envenas Tiemej kun korbo.

Tiemej: Paĉjo!

Li: Ho, estas vi, Tiemej!

Tiemej: Jes!

Li: Tiemej, kiel iris via negoco hodiaŭ?

Tiemej: Negoco? Hm! La ĝendarmoj kaj iliaj
lakeoj intence ĉikanis per korpo-traserĉoj
kaj ĉiujn maltrankviligis. Kiu do pensis an-
koraŭ pri aĉeto!

Li: Banditoj!

Tiemej: Estu ankoraŭ pli singardema, paĉjo!

Li: Tiemej! iru hejmen kaj diru al avino, ke la
onklo baldaŭ venos.

Tiemej: Onklo?

Li: Jes, petu avinon prepari manĝon.

Tiemej: Jes.

Li: Tiemej, venu ĉi tien. (*Metas sian koltukon ĉirkaŭ
sian kolon.*)

Tiemej: Mi ne sentas malvarmon. Paĉjo, de kie
estas tiu onklo, kiu venos hodiaŭ vespere?

Li: Ne demandu pri tio, vi knabineto.

Tiemej: Nu, mi iros demandi avinon.

Li: Jen vi!



Li Juhe

Tiemej: Paĉjo, revenu frue. (*Foriras.*)

Li: Bona knabino!

*Karbokernojn ŝi kolektas kaj kolportas varon,
Plie ĉerpas akvon kaj disfendas brullignaron.
Lerte zorgas ŝi pri hejmaferoj kaj kalkuloj,
Frue dommastrumas la infan' de malriĉuloj.
Kiaj la plantitaj arboj, tiaj fruktoj estas,
Kiaj la metitaj semoj, tiaj floroj kreskas.*

Envenas Vang Lian-gju.

Vang: Kiu estas tie?

Li: Mi.

Vang: La japanaj diabloj dense gardostaras
hodiaŭ, maljuna Li. Ŝajne ili havas ion por
fari.

Envenas patrole du japanaj ĝendarmoj. Vang kaj Li
apartigas sin. Foriras la japanoj.

Vang: (*elpoŝigas cigaredon*) Ĉu vi havas alumeton?

Li: Jes, jes. (*Li iras al Vang por bruligi lian cigaredon.*)
La situacio estas tre streĉita, maljuna Vang.
Ni estu ekstreme singardaj kaj kiel eble malof-
tigu niajn renkontiĝojn, de nun unufoje po dek
tagoj. Mi sciigos vin poste la lokon.

Vang: Bone.

Mallumiĝo. Longa fajfo en malproksimo kaj bruado
de trajno, kiu rapide pasas post la deklivo. Li kaj
Vang foriras.



Avino Li

Kiam la trajno alproksimiĝas al la stacio, la kuriero elsaltas el vagono. La japanaj ĝendarmoj sur la trajno faris du pafojn. La kuriero envenas de maldekstre kun mano premanta al la brusto kaj falas apud la relvojo. Rimarkinte lin de malproksime, Li kaj Vang alrapidas por lin subteni.

Li (*levas la kurieron*): Kiel? amiko!

Kuriero (*rekonsciiĝas kaj rigardas ĉirkaŭen*): Kiu loko estas ĉi tie?

Li: La komutejo n-ro 51. Vi...

Kun penego la kuriero surmetas bluan ganton sur sian maldekstran manon kaj ĝin levas. Tiam li svenas.

Li (*al si*): Kun ganto sur la maldekstra mano.

(*Al Vang*) Li estas nia homo.

En malproksimo voĉoj kaj paŝbruoj de japanaj ĝendarmoj.

Vang: Forportu lin rapide. Mi ŝirmos vin.

Li: Bone. (*Portas lin sur sia dorso kaj foriras.*)

Aŭdiĝas pli laŭtaj voĉoj kaj paŝbruoj.

Vang elprenas sian pistolon kaj pafas dufoje al la direkto kontraŭa al tiu de Li. Refoje eksonas voĉoj kaj paŝbruoj, kiuj antaŭsignas la venon de la japanaj ĝendarmoj. Por trompi la malamikojn, kun kunpremitaj dentoj, Vang pafas sin je la brako kaj falas sur teron.

Venas la japana kaporalo, Hoŭ Hianpu kaj kelkaj ĝendarmoj.



Li Tiemej

Kaporalo (*al Vang*): Elsaltanto de la trajno ĉu estas?

Vang (*montras en la direkto al la kontraŭa flanko kaj intence ĝemas*): Tie.

Kaporalo (*konsternite*): Kuŝiĝu!

Ĉiuj japanaj ĝendarmoj kuŝigas sin sur la teron.

— La kurteno falas.

(*Daŭrigota*)



BATALO DE TAJLANDAJ LABORISTOJ KONTRAŬ EKSPLUATADO KAJ SUBPREMADO

En 1968, la tajlandaj laboristoj senĉese disvolvis batalojn kontraŭ la kruela subpremado kaj ekspluatado fare de la usona imperiismo kaj Thanom-Praphas-kliko.

La pliparto de la tajlandaj laboristoj devas labori ĉiutage 12-16 horojn, ricevante tre malaltan salajron, kiu ne sufiĉas por vivtenado. Ili krome suferas konstante la tiranadon kaj kruelan ekspluatadon de kapitalistoj de Usono kaj aliaj landoj. Mankas al ili laborprotekto kaj ofte okazas akcidentoj de vundo kaj morto.

Por defendi siajn justajn rajtojn, la tajlandaj laboristoj senĉese leviĝadis al bataloj. Laŭ nekompleta statistiko, de la jarkomenco ĝis septembro en 1968, en la tuta lando eksplodis sume tridek laboristaj bataloj, en kiuj partoprenis 10,000 personoj. De 1964 ĝis nun, en la tuta lando okazis 176 bataloj en formoj de striko de laboristoj kaj aliaj, kun partoprenantoj en sumo de pli ol 50,000. Tiuj bataloj de la laboristoj strikte ligiĝis kun la revolucia armita batalo de la popolo en la kamparo kaj peze batis la usonan imperiismon kaj Thanom-klikon.

BATALO DE MEKSIKIAJ LERNANTOJ KONTRAŬ PERSEKUTADO

La vastaj amasoj de meksikiaj junaj lernantoj disvolvis heroan batalon senprecedence intensan kontraŭ la sanga subpremado, kiun la meksikia reakcia registaro faris kontraŭ ili.

La fokuso de la batalo de la lernantoj estas protesto kontraŭ la perfortaĵoj faritaj, por subpremi la studentan movadon kaj kruele persekuti la progresemajn lernantojn, de la t. n. "Kontraŭtumulta Taĉmento", kiu estas rekte trejnita de la usona imperiismo kaj servas speciale por subpremi progresemajn amasajn movadojn. Jam en la komenco de la batalo, la lernantoj elmetis klarajn politikajn postulojn, kiaj malorganizo de la nomita

taĉmento, abolo de la leĝoj servantaj por subpremi popolajn movadojn, liberigo de la politikaj malliberuloj kaj arestitaj lernantoj, puno al la murdistoj kaj kompenso al la familio de mortigitoj.

Tiu ĉi batala ŝtormo komenciĝis per la ĝenerala lernostriko kaj granda manifestacio de la vasta lernantaro en la urbo Meksiko en la lasta tagdeko de julio pasintjare. La batalo tre rapide etendiĝis de la ĉefurbo Meksiko al Nuevo Leon kaj aliaj sume pli ol dek provincoj kaj kelkaj gravaj urboj, kaj de striko de lernantoj al grandaj manifestacioj kaj amasaj mitingoj envolvantaj laboristojn, kamparanojn, instruistojn kaj patriotojn el diversaj tavoloj en nombro de centoj da miloj. La 27-an de aŭgusto, ducent mil lernantoj, laboristoj kaj kamparanoj de la ĉefurbo okazigis grandiozan manifestacion kontraŭ subpremado. Kiam la manifestaciantoj trapasis la stratojn, amasoj da preterpasantoj senĉese hurais al ili. Tiu estis la plej granda amasa manifestacio en Meksiko en la pasintaj kelkdek jaroj.

JAPANAJ STUDENTOJ OPONAS LA REAKCIAN EDUKAN SISTEMON

Spite al la subpremado fare de la polico de la reakcia Sato-registaro kaj la subfosado fare de la reviziisma kliko de la Japana Komunista Partio, la studentoj de diversaj lokoj de Japanio disvolvis batalojn kontraŭ la putra eduka sistemo kaj la utiligo de esploraj laboroj de universitatoj en servo al militaj celoj fare de la usonaj kaj japanaj reakciuloj.

Je la 9-a de oktobro de la pasinta jaro, kun kaskoj sur la kapoj kaj ponardoj en la manoj, du mil studentoj de tiu ĉi universitato okazigis mitingon antaŭ la domo de la ekonomia fakultato. Post la mitingo la studentoj faris grandiozan manifestacion sur la proksimaj stratoj.

Studentoj de Keio-universitato en Tokio oponas kontraŭ la aŭtoritato de la universitato, kiu akceptis monon de la usona armeo kaj faras por ĝi esploradon de bakteria armilo. Ili postulis ke la universitata aŭtoritato publike konfesu sian krimon kaj klare deklaru en kaj ekster la universitato rifuzon de la mono liverita de la aŭtoritato de la usona armeo.

En tiu ĉi batalo la studentoj de Keio-universitato malkaŝis la malnoblan intrigon de subtenado al la usonaj kaj japanaj reakciuloj en ilia detruado al studentaj movadoj faritan de la "Unuiĝo de Demokratiaj Junuloj" kontrolata de la reviziisma Mijamoto-kliko de la Japana Komunista Partio.

Sur la kovrilo:

Nia granda gvidanto Prezidanto
Maŭ revuas sur la pordego
Tian-anmen la paradantajn revo-
luciajn amasojn.

Sur la dorskovrilo:

Varma celebrado de la 19-a
datreveno de la fondiĝo de la
Ĉina Popola Respubliko

EL POPOLA ĈINIO

人民中國報

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO
P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 1 (126) 1969

Ĉefa Enhavo

Varma Gratulo de Prezidanto Maŭ al Kamarado Hoxha
Okaze de Lia 60-jara Festo de Naskiĝtago

Nova Kulmino de Granda Batala Amikeco

Tri Gravaj Paroladoj de Kamarado Enver Hoxha Aperis
Ĉine en Nia Lando

Grava Surskribo de Prezidanto Maŭ por Japanaj Laboristoj-
Amikoj

La Direkto al Venko de la Revoluciaj Popoloj de Ĉiuj
Landoj

La Ĉina Laborista Klaso Ĉiam Fidelas al Prezidanto Maŭ

La Laborista Klaso Devas por Ĉiam Gvidi la Lernejojn

Estu Forta Apoganto de la Laborista Klaso

Estu Kuracisto Bonvenigata de Malmaltraktitoj kaj
Malsuperaj Mezkampanoj

Antaŭen en la Vasta Mondo!

Por Ĉiam Esti Lernanto de Laboristoj

Memkonscie Akcepti Reedukon de la Laborista Klaso

Venke Finkonstruigis la Fervoja Parto de la Nankina Jangzi-
pontego

Elhako de Nova Vojo de Profunda Subakviĝo

Verkoj de Maŭ Zedong Broŝure Eldonitaj en Esperanto

Nova Fizionomio ĉe la Rivero Kabo

Hiŝuangbanna en Vigla Prosperado

Abunda Rikolto de Rizo sur Salalkala Tero


La Sovetunia Reviziisma Kliko Praktikas Faŝisman Dikta-
turon super la Laboristoj

Ruĝa Signal-lanterno (*Pekina Opero*)

*La Revolucio
Stimulas la Produkton
kaj de la Produkto
Venas Ĝojinformoj*



Des pli ruĝas la ruĝa standardo de Daking-petrolkampo sub la brilo de la penso de Maŭ Zedong.



Supre maldekstre: La popola komunumo Tajjangŝeng en Gajhian-gubernio, Liaŭning-provinco, akiris riĉan rikolton de pomoj. La malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj selektas bonajn pomojn por vendi al la ŝtato.

Supre dekstre: De la jaro 1968, la Daking-a Olekampo ĉiumonate plenumis kaj superplenumis la ŝtatan planon de produkto, prilaboro kaj transporto de kruda oleo. La taga produktkvanto de kruda oleo jam superis la plej altan nivelon de la pasintaj jaroj. La foto montras grandan kvanton de kruda oleo pretigita por transporto.

Sube maldekstre: La ĉefaj indicoj de transporto de Dalian-a Fervoja Branĉa Oficejo grandmezure leviĝis. La turnoplato de ĝia lokomotiva sekcio estas en funkciado.

Sube dekstre: La antaŭurboj de Pekino venkis eksterordinare grandan sekecon kaj bataliĝis agrikulturan riĉrikolton. Anoj de la popola komunumo Vanghinguang de Pinggu-gubernio rikoltas novan kotonon.





Denove bona rikolto en Lankau




Firme tenante revolucion kaj forte stimulante produkton, la oficistoj kaj laboristoj de la dua ŝarĝ-distrikto de Ŝanhaja Havena Administracio uzis nur 76 horojn kaj 40 minutojn por elŝipigi pli ol 34,000 tunojn da nepakitaj varoj el granda varŝipo kaj tiel kreis novan rekordon en maŝarĝo de fremda ŝipo.





La armeanoj kaj popolanoj estas tre ĝojaj renkonte al la deka abundjaro de post la demokratia reformo en Tibeto.



毛主席万岁

毛主席万岁

毛主席万岁

毛主席万岁

毛主席万岁

不忘阶级斗争！

不忘阶级斗争！